

**INTERNACIA  
MONDLITERATURO**


---


**ŜALOM-ALEĤEM  
PEREC**

**Hebreaj  
Rakontoj**

---

**FERDINAND HIRT & SOHN  
LEIPZIG, ESPERANTO-FAKO**





# INTERNACIA MONDLITERATURO

Kolekto de la plej famaj verkoj  
el ĉiuj naciaj literaturoj

---



---

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1923  
ESPERANTO-FAKO

ŜALOM - ALEĤEM  
PEREC

---

# HEBREAJ RAKONTOJ

El la hebreaĵ originaloj tradukis

**Is. Muĉnik**

Membro de la Esperantista Lingva Komitato

---

---

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1923  
ESPERANTO-FAKO

546860



82-3

ĈIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVATAJ

821.112.28-3 (082.2)

PRESEJO BREITKOPF & HÄRTEL, LEIPZIG

## Enhavo.

	Paĝo
Antaŭparolo . . . . .	7

### Ŝalom-Aleĥem:

La miraklo de „Hoŝano rabo“ . . . . .	13
Ne estas feliĉo . . . . .	26
Rabĉik . . . . .	31
La trezoro . . . . .	44
Legendo pri la kreado de l'virino . . . . .	44
Aforismoj . . . . .	45

### I. L. Perc:

Kio estas animo (Historio de mia juneco) . . . . .	49
Fratinoj . . . . .	60
Pidjon ŝebuim (El la hebrea vivo en Polujo) . . . . .	65
Oni ree ekuzis la pendigilon . . . . .	71
Hormuz kaj Aĥrimon . . . . .	74

---





## Antaŭparolo.

**L**a hebrea literaturo estas tiom malnova, kiom la hebrea popolo, kaj ĝi estas dividata en diversaj epokoj, pri kiuj mi, bedaŭrinde, ĉi tie ne havas la eblecon paroli pro manko de loko. Mi tamen diros kelkajn vortojn pri la lasta epoko de la hebrea moderna, t. n. *juda*, literaturo, el kiu tiu ĉi verketo estas tradukita.

Estas konate, ke la Hebreoj havas — krom sia nacia lingvo, la antikve-hebrean — ankoraŭ unu lingvon, la judan aŭ la germanan ĵargonon, kiu estas tiel nomata pro tio, ke ĝi estas tre simila al la lingvo germana, kaj kiu estas lastatempe nomata „juda“ pro tio, ke ĝi fariĝis preskaŭ la gepatra lingvo de la Hebreoj. Tiu ĉi lingvo havis dum longa tempo nenian literaturan valoron, ĉar verki en tiu ĉi lingvo estis profani la verkon . . . kaj ĉio estis verkata en la antikve-hebrea lingvo, pro tio, ke ĝi estas la lingvo nacia, la „Sankta lingvo“. Sed la supereco de la lasta iom post iom malfortiĝis en la diasporo pro tio, ke ĝin komprenas preskau nur instruituloj, inteligentuloj. La popolamaso uzas kaj komprenas nur la ĵargonan lingvon . . . kaj tio devigis la hebreajn verkistojn en la dua duono de la XIX. jarcento, veni al la popolamaso *en ĝia lingvo*.

La unua, de kiu komenciĝas la klasika juda literaturo, estas „Mendeli-Moĥer-Sforim“ (Ŝ. J. Abramoviĉ), kiun oni nomas avo de la ĵargona literaturo. Liaj verkoj

distingiĝas per sia genia, artista pentrado de la hebrea vivado kaj faras nesupozeblajn impresojn je la hebrea mondo. Unu pola verkisto, ekzemple, lernis intence la judan lingvon, por traduki polen lian majstroverkon „Ĉevalinaĉo“<sup>\*)</sup>.

Poste aperas la verkistoj: Spektor, A. Rajzin, Dinenzohn, Ŝ. Aŝ, Nomberg k. a., kiuj estas la ĉefoj de la juda moderna literaturo, kiu nun per sia riĉeco kaj enhavo povas esti komparata kun la plej granda alinacia literaturo, kiu ekzistas jam de jarcentoj; kaj fine venas la plej popularaj, plej famaj verkistoj Ŝalom-Aleĥem (Ŝ. J. Rabinoviĉ) kaj I. L. Perc — la aŭtoroj de tiu ĉi verketo.

*Ŝalom-Aleĥem* (1853—1915) estas la sola hebrea popola humoristo; liaj verkoj estas popularaj inter ĉiuj klasoj de la Hebreoj. Ne estas domo, kie oni ne legas ilin, kie oni ne ripetadas liajn aforismojn, ekzemplojn kaj epizodojn, kiuj sonas kvazaŭ legendoj. Per sia mordanta humoro kaj satiro li majstre malkovras kaj pri-skribas la plej ridindajn flankojn de la Hebreo, liajn suferojn, ĝojon, malĝojon en tia maniero, ke la leganto jam ĉe la unua linio estas malhelpata de profunda ridado, kiu ekposedas lin kaj lin ne forlasas ĝis la fino de l' verko. . . Tio tamen ne estas simpla ridado, sed ridado per larmoj. . . Ŝalom-Aleĥem enpenetras en ĉiujn, ĉiujn flankojn de la hebrea vivo, ne evitante eĉ unu okazon. Ŝalom-Aleĥem estante ankoraŭ 10-jara knabo amuzas siajn kunlernantojn, prezentante en la lernejo

---

\*) Verko tradukinda esperanten.

teatraĵojn kune kun sia samaĝa kamarado Meirka Medvedivker, la filo de malriĉa hebrea „melamed“ (instruisto de Ŝalom-Aleĥem). Tiu ĉi Meirka fariĝis poste la fama rusa aktoro de la reĝa teatro, la fama Mjedvjedjev! Ŝalom-Aleĥem naskiĝis kaj mortis ridante. Ĉiuj liaj verkoj portas la devizon: „ridi estas saniga afero, kuracistoj konsilas ridi“, kaj Ŝalom-Aleĥem konsilas do pli bone *ridi* je propraj malprosperoj aŭ malfeliĉo — ol plori, kio certe nenion alportos. Antaŭ sia morto Ŝalom-Aleĥem verkis epitafon por si mem, proksimume de la jena enhavo: „Tie ĉi estas enterigita simpla judo, kiu skribis librojn por viroj kaj virinoj, vergante, vipante, neniun indulgante, ĉu laboriston, doktoron, komerciston, profesoron ktp., ktp.“ Pro liaj specifa skribmaniero kaj parolturnoj, per kiuj li imitas la popolamasojn, estas treege malfacile traduki liajn verkojn, kaj nur per granda peno oni povas tion fari, elektante tamen *tradukeblajn verkojn* . . . tion oni rimarkas, kiam oni legas ekz. la rusan aŭ la antikve-hebrean tradukon de lia verkaro!

Ŝajnas al mi, ke la *provo* de mia esperanta traduko de Ŝalom-Aleĥem multe pli bone sukcesis, kaj mi tre ĝojas la flekseblecon kaj riĉecon de nia lingvo. Sed mi volonte deziras aŭdi la opinion pri mia provo ankaŭ de alinaciaj samideanoj, kio eble donus al mi, aŭ al aliaj, la kuraĝon daŭrigi la tradukadon de Ŝalom-Aleĥem.

La dua aŭtoro, *I. L. Perec*, enportis novan spiriton en la judan literaturon kiel moralisto, kaj precipe distingigas per sia modernigo kaj prilaborado de la ortodoksa verkaro, kaj kiel ĉefo de la hebrea moderna literaturo plej vere reprezentas la hebreon, kiun oni povas tre facile

kompreni, *sed oni ne volas*, por povi lin ĉiuokaze persekuti . . . .

Mi do esperas, ke vi, samideanoj, en Esperanto certe pli bone komprenos lin, ĉu ne?

Har-Kineret (Palestino), 24 de julio 1922.

**I. Muĉnik**

Membro de la Esperantista Lingva Komitato.

*ŜALOM-ALEĤEM*



## La miraklo de „Hoŝano rabo“\*).

### Prologo.

**C**u vi scias per kio estas plej bone, plej oportune, plej trankvile veturi? — Per la „mallaboremulo“! Tiel nomis la Bohopolaj judoj la malvastan vagonaron, kiu preterpasas tutan vicon da urbetoj: Bohopol, Hajsin, Teplik, Nemirov, Ĥaŝĉevate, kaj ankoraŭ tiajn „benitajn“ lokojn, kie la piedo de Adamo neniam paŝis. La Bohopolaj judoj, famaj „sprituloj“, rakontas pri la „mallaboremulo“ multajn aventurojn kaj laŭdojn. Unue vi ne timas, ke vi malfruos, kiam ajn vi venos, vi „kaptos“ ĝin. Due, kiom valoras tio, ke vi ne devos malpaci pro loko? Vi povos veturi sola, grandan spacon kuŝante en ĝi kiel princo kaj dolĉe dormi. Tio ĉi estas serena vero. Jam de du semajnoj mi vojaĝas per tiu ĉi „mallaboremulo“, en tiu ĉi angulo, kaj staras sur unu loko, kvazaŭ sorĉo estus! Sed ne pensu, ke mi plendas, kontraŭe, mi estas tre kontenta, ĉar mi vidas tiajn belajn aferojn, kaj mi aŭdas tiom multe da rakontoj kaj aventuroj, ke mi ne scias, ĉu mi povos ĉion rakonti al vi. Unue estas priskribinde, kiel oni konstruis la fervojon. Kiam venis la sciigo el Peterburgo, ke oni

---

\*) Rimarko: Tiuj ĉi rakontoj de Ŝalom-Aleĥem estas tradukitaj el la verko „Skriboj de komizvojaĝisto“.

Antaŭfesta tago, dum kiu estas finata, en la ĉielo, ĉies proceso, kiu komenciĝis en la „indulgofesto“.

trakondukos, en tiu regiono, fervojon, la judoj diris: „Absoluta malvero! Por kio bezonas Teplik, Golto aŭ Hajsin — fervojon? Ĉu ili ne estas alie ‚edukitaj‘ ol nur sur fervojoj? . . .“ Tiel rezonis la lokaj judoj. Kaj la Bohopolaj judoj ankoraŭ pli multe mokis, kaj montrante la manplaton ili diris: „Kiam ĉi tie kreskos haroj, ni tiam havos, ĉe ni, fervojon.“ Poste kiam alveturis inĝeniero, komencis fari planon kaj mezuri la kampojn, — la judoj eksilentis kaj la Bohopolaj „sprituloj“ jam kaŝis la manojn (ili ne perdas la kuraĝon, se ili ne divenas; „la antaŭdiristoj“ — ili diras — „ankaŭ iam ne divenas“ . . .). Oni finis la konstruadon de l’fervojo kaj, kvankam la Bohopolaj judoj alnomis ĝin, kiel ni scias, „mallaboremulo“, ili tamen nun tre laŭdas ĝin, kaj ili rakontadas pri ĝi mirindaĵojn, legendojn kaj miraklojn. Ekzemple, ili fanfaronas, ke de kiam la „mallaboremulo“ estas vagonaro, ankoraŭ ne okazis per ĝi malfeliĉo, kiel okazis ofte per aliaj vagonaroj. Sed kial nia „mallaboremulo“ ne kaŭzas katastrofon? — „Tute simple!“ — ili diras — „*kiu iras malrapide, tiu ne falas*“ . . . La „mallaboremulo“ gardas ĉi tiun principon kaj iras malrapide, jam tro malrapide. La Bohopolaj „sprituloj“ rakontas aventuron, kiu okazis kun ilia samurbana mastro: „Bohopola mastro“ — ili rakontas — „elveturis per la ‚mallaboremulo‘ el Bohopol en Ĥaŝĉevaton, por ĉeesti ceremonion de cirkumcido\*), kaj li venis ĝuste al dektrijara naskiĝtago de l’cirkumcidito.“ Kaj ankoraŭ aventuron ili rakontas, aventuro de Berŝeda fraŭlino

---

\*) La ceremonio de cirkumcido okazas la okan tagon post la naskiĝo de l’infano.



kun Nemirova fraŭlo, kiuj veturis renkonte unu al la alia, por rendevuo, sed, ĝis kiam ili kunveturis, la fraŭlo fariĝis dum la veturado „griza kiel kolombo“, kaj la fraŭlino jam ne havis unu denton en la buŝo kaj pro tio disiĝis la svato . . . sed, vi scias, kion mi diras al vi? Mi ne amas la Bohopolajn „spritulojn“, kaj malamas iliajn legendojn, se mi priskribas aferon, ĝi estas vidita de mi mem, aŭ rakontita almenaŭ de kredindaj homoj, de komercistoj. Ekzemple, mi mem aŭdis de Hajsina komercisto, ke antaŭ kelke da jaroj dum „Hoŝano rabo“ okazis ĉe ili, per la „mallaboremulo“, malfeliĉo, oni povas diri katastrofo, kies paniko ekregis la homojn de la tuta regiono. La katastrofo okazis pro judo kaj rusa pastro. Mi rakontos al vi la historion, tiel same, kiel mi ĝin aŭdis de l’Hajsina komercisto, kaj kiam vi tralegos ĝin, vi mem konvinkiĝos, ke la historio estas vera. Hajsina komercisto ne mensogas.


---

„La miraklo de Hoŝano rabo — tiel oni alnomis ĉe ni la fervojan katastrofon, kiu okazis dum „Hoŝano rabo“ en nia urbo Hajsin, t. e. ne en Hajsin, sed du staciojn antaŭ Hajsin, t. e. en Sobolivko. . .“ Tiamaniere la Hajsina komercisto komencis rakonti al mi la fervojan katastrofon, kiu okazis per la malgranda fervojo, kiun oni nomas „mallaboremulo“ (mi jam priskribis la „mallaboremulon“ en la prologo), kaj ĉar la Hajsina komercisto rakontis al mi ĉi tiun historion veturante per la „mallaboremulo“, kiu havas tempon, kaj en la vagono estis nur du pasaĝeroj, t. e. mi kaj li, tial li malbutonumis sian surtuton, kuŝiĝis kiel princo, rakontis mal-

rapide per tirataj vortoj, karesis dum la rakonto sian ventron, ridetis kaj estis tre kontenta pri sia propra rakonto.

„Vi veturas ja per nia ‚mallaboremulo‘ jam de du semajnoj. Vi certe scias ĝian kutimon! Ĝi havas kutimon, kiam ĝi venas al stacio kaj haltas — ĝi forgesas, ke ĝi devas iri pluen! Laŭ la ‚leĝo‘ ĝi devas halti ne pli multe ol kiom estas fiksita. Ekzemple, je la stacio Zatkeviĉ estas fiksita, ke ĝi devas halti ĝuste horon kaj kvindekminutojn, aŭ je la stacio Sobolivko — pri kiu mi rakontas al vi — tie eĉ sekundon pli ol unu horo kaj 32 minutojn; ĝi ne devas stari, sed la diablo prenu ĝin tiom da fojoj, kiom ĝi staras en ambaŭ stacioj pli ol du kaj iom — pli ol tri horojn. Dependas de tio, kiom da tempo daŭras ĝiaj ‚manovroj‘ kaj kiajn manovrojn nia ‚mallaboremulo‘ faras — mi klarigos al vi. Oni maljungas la lokomotivon kaj la ‚brigado‘: la konduktoro, maŝinisto kaj la hejtisto, sidiĝas kune kun la staciestro, ĝendarmo, telegrafisto kaj trinkas bieron, botelon post botelo. Kion faras ekzemple la vojaĝantoj dum la ‚manovroj‘? Vi ja vidas, kion oni faras: oni enuas, oni preskaŭ freneziĝas, unu oscedas, la alia ekdormas en angulo, unuj promenas sur la pavimo kun kunmetitaj manoj sur la brusto kaj kantas mallaŭte kanton, ktp. Unu fojon, dum la ‚manovroj‘ en Sobolivko okazis afero: Estis matene, dum ‚Hoŝano rabo‘ staras iu homo apud la maljungita lokomotivo kaj rigardis; li estas, prezentu al vi, ne pasaĝero, sed Sobolivka judo, mastro. Kion do faras ĉi tie Sobolivka mastro? — estas facile kompreneble! Okaze de ‚Hoŝano rabo‘ la Sobo-

livka mastro dece estas preĝinta, bone manĝinta. Lia humoro estas duonfesta, gaja! Lia ‚proceso‘ en la ĉielo estas ja tute egale finita, laboron li ankaŭ ne havas, do li prenis la promenbastonon, kaj foriris al la stacidomo por renkonti la vagonaron. ‚Renkonti la vagonaron‘, vi devas scii, estas kutimo en nia regiono. Kiam la vagonaro estas venonta, vi kvazaŭ per magneto estas altirata al la stacidomo: ‚Eble oni vidos iun.‘ Kion vidi? Kiun vidi? Teplikan judon? Obodivkan judinon? Golovonevskan pastron? Kia ajn estas la intereso, oni ‚iras renkonti‘. Des pli, ke la fervojo estas ĉe ni novaĵo — sed mi tion ne celas, mi rakontas nur, ke dum ‚Hoŝano rabo‘ staris apud la maljungita lokomotivo bonhumora Sobolivka mastro kun bastono kaj rigardis. Nu, kiun tio ĉi koncernas, se mastro el Sobolivko staras kaj rigardas maljungitan lokomotivon? Ŝajnas — neniun, sed ne! Malfeliĉe inter la pasaĝeroj estis rusa pastro el Golovonevsko, urbeto ne malproksima de Hajsin. Li ankaŭ ne havas laboron, do li promenas sur la pavimo, haltas kaj ankaŭ rigardas la maljungitan lokomotivon, kaj poste li diras al la judo: ‚Aŭskultu, Judko, kion vi ekvidis ĉi tie?‘ kaj la judo respondas: ‚Oni ne nomas min Judko, sed Berko.‘ — ‚Estu Berko — diras la pastro — kion vi rigardas, Berko?‘ Tiam la judo respondas al li kaj ne deturnas siajn okulojn de la lokomotivo: ‚Mi staras kaj observas la miraklon de Dio, nome, ke per bagatelo, t. e. per unu turno de l’ŝraŭboj, tien kaj returnen — tia kolosa maŝino ekiras!‘ — ‚Kiel vi scias — diras la pastro — ke, se oni turnas unu ŝraŭbon tien kaj unu returnen, ekiras la maŝino?‘ kaj la judo



respondas: ‚Se mi ne scius, kion do mi dirus?‘ Kaj la pastro diras: ‚Kuglon\*) vi scias manĝi, jen, kion vi scias!‘ Tio ĉi jam ĉagrenis la judon (Sobolivkaj judoj havas ambicion) kaj li diras al la pastro: ‚Ĉu vi, paĉjo, eble bonvolus supreniri kun mi sur la lokomotivon, mi komprenigus vin, kial iras lokomotivo kaj kial ĝi staras?‘ Tio ĉi forte kolerigis la pastron: ‚Tiu ĉi judo komprenigos lin, kial iras lokomotivo kaj kial ĝi staras?!‘ . . . kaj li kun galo ekdiras al la judo: ‚Grimpu, Herŝko, sur la lokomotivon.‘ — ‚Oni ne nomas min Herŝko — respondas la judo — sed Berko.‘ Kaj la pastro diras: ‚Estu Berko, grimpu, Berko!‘ Tiam la judo diras: ‚Kial mi grimpu? antaŭe grimpu vi, paĉjo!‘ Sed la pastro kolerige diras al li: ‚Vi ja min instruas kaj ne mi vin, tial vi devas antaŭe grimpi.‘ Unuvorte, ili ambaŭ surgrimpis la lokomotivon kaj la Sobolivka judo komencis instrui la pastron pri la ‚scienco de maŝino‘, ekturnis malrapide unu kranon tien, la alian returnen, kaj — antaŭ ol ili prosperis eligi vorton el la buŝo, ili timigitaj ekvidis, ke la lokomotivo ekmoviĝas de la loko kaj — for! . . .

Nun, ŝajnas al mi, estas la plej bona tempo, forlasi la judon kun la pastro sur la maljungita lokomotivo, ili veturu feliĉe, kaj mi klarigu la demandon: ‚Kia estas la Sobolivka judo, kiu havis la kuraĝon grimpi kun pastro sur maljungitan lokomotivon?‘ Berko Vinagrofaristo — tian nomon havas la Sobolivka judo. Kial oni nomas lin vinagrofaristo? Ĉar li okupiĝas per tio, ke li faras vinagron, la plej bonan vinagron en nia re-

---

\*) Hebrea sabata manĝaĵo.

giono. Tiun ĉi profesion li, verdire, heredis de sia patro, sed li elpensis — tiel diras Berko mem — tian maŝinon, kiu produktas la plej bonan esencon. Se li havus tempon — li diras — li povus liveri vinagron al tri gubernioj. Sed kial ne? Li tion ĉi ne volas — diras li — li ne estas monavida. Jen tia homo estas nia vinagrofaristo. Nenie li lernis — kaj scias ĉian delikatan metion kaj havas percepton de ĉiuj maŝinoj, sed kiamaniere? — Tion oni devas kompreni ‚laŭ la saĝo‘, ke ‚la vinagrofarado‘ estas simila — diris li — al brandfarado, kaj la brandfarado apartenas al la vorto ‚fabriko‘, kaj fabrikoj havas ja la samajn maŝinarojn, kiujn vagonaro havas: fabriko — li diras — fajfas, kaj vagonaro fajfas. — Kia diferenco? La ĉefaĵo estas nur la forto, kiu fariĝas de l’hejtado. La kaldrono varmiĝas, la akvo ekbolas kaj ĝi puŝas tiam, la radoj ruliĝas je kiu flanko vi volas: Se vi volas — li diras — ke ĝi iru dekstren — ekturnu la regulatoron dekstren, se vi volas maldekstren — turnu la regulatoron maldekstren. Tio estas — li diras — tiel simple, ke pli simple jam ne povas esti! . . .

Nun, post kiam mi konigis al vi iom la Sobolivkan judon, mi jam povas reiri al la katastrofo. Ĉu mi devas ankoraŭ rakonti al vi, kia teruro, kia bruo fariĝis inter la pasaĝeroj en la Sobolivka stacio, kiam ili ekvidis la maljungitan lokomotivon sole kurantan, — ĉu oni scias per kia forto? — Mi opinias, ke tion vi devas mem kompreni. Komence la ‚brigado‘ ekkuris, verŝajne, por kapti ĝin, sed oni rapide konvinkiĝis, ke la penado estas vana: La lokomotivo kvazaŭ spite kuris la nunan fojon

furiozrapide, tial la brigado estis, bedaŭrinde, devigata reiri sen la lokomotivo kaj, kune kun la ĝendarmo kaj la staciestro, oni faris protokolon kaj poste oni dissendis al la stacioj depeŝojn: *„La lokomotivo mem forkuris, apliku rimedojn. Telegrafu!“* Kian panikon tiu ĉi depeŝo faris, estas facile imageble. Unue oni ne komprenis la depeŝon: *„Lokomotivo mem forkuris?“* kiel povas mem iri lokomotivo? kaj due, kion signifas *„apliku rimedojn“*? Kiajn rimedojn oni povas apliki, krom depeŝoj? Kaj efektive, la depeŝoj ekflugis je la tuta regiono. Ĉiuj stacioj interparolis kaj la terura sciigo disvastiĝis en ĉiuj urboj kaj urbetoj kaj mallumo ekregis! Ĉe ni ekzemple en Hajsin, oni jam eĉ rakontis, *„kiom da homoj mortigis de la terura morto!“* *„Kaj kiam? — ĝuste dum „Hoŝano rabo“, post la ĉieljuĝo!“* *„Ŝajnas, ke ili „supre“ jam estis kondamnitaj... Tiel oni parolis ĉe ni en Hajsin kaj en ĉiuj lokoj. La doloroj kaj afliktoj, kiujn ni suferis, ne estas priskribeblaj, sed ili tamen ne estas kompareblaj kun tiuj afliktoj de la pasaĝeroj, kiuj restis en la Sobolivka stacidomo, kiel ŝafoj sen paŝtisto en la mezo de vojaĝo sen lokomotivo! „Kion ili faros? estas „Hoŝano rabo“ antaŭfesto, ne restas pli ol festi, ĉi tie en la urbeto?“... Kaj la pasaĝeroj kolektiĝis ĉiuj en unu angulo kaj komencis paroli pri sia propra situacio, kaj pri la forkurinta lokomotivo: Kiu scias, kio povas okazi per tiu ĉi „forkurinto“? Ĝi ja povas renkonti la „mallaboremulon“, kiu iras renkonte al ĝi el Hajsin, trans Zatkeviĉ, en Sobolivkon; kiel suferos tiuj pasaĝeroj? Kaj ili jam antaŭvidis teruran katastrofon — — — renversiĝintajn vagonojn, homajn kapojn,*

rompiĝintajn piedojn, manojn kaj per sango ŝprucitajn valizojn! Subite depeŝo venis el Zatkeviĉ: *„Ĵus transflugis per diabla rapideco, preter Zatkeviĉ, lokomotivo kun du pasaĝeroj. Unu aspektas kiel judo, la dua — kiel pastro. Ambaŭ ŝvingis per la manoj — oni ne scias kial. La lokomotivo forkuris en Hajsin-on.“* Jen, eĉ tio, ankoraŭ pli multe surprizis: *„Kion signifas judo kun pastro sur forkurinta lokomotivo? Kiel ili forkuris? Kaj por kio? Kiu estas la judo?“* . . . Iom post iom — oni fine sciiĝis, ke li, la judo, estas el Sobolivko. Kiu? Ĉu vi ne konas lin? Stranga demando! Tiu ĉi ja estas Berko, vinagrofaristo el Sobolivko!

Sobolivkaj judoj ĵuras, ke ili mem de malproksime vidis, ke li, Berko, staris kun la pastro apud la maljungita lokomotivo kaj ŝvingis per la manoj! . . . Oni tiel longe parolis kaj bruis, ke la okazintaĵo venis en la urbeton, en Sobolivkon, sed kvankam la urbeto ne estas malproksima de la stacidomo, ĝis kiam la okazintaĵo venis de unu homo al alia, en Sobolivko, ĝi akiris ĉiunminute alian figuron. Ĉiu almetis vorton, kaj ĝis kiam ĝi venis en la hejmon de Berko, la *„okazintaĵo kun la pastro“* estis tiel stranga, ke la edzino de Berko svenis dekfoje kaj oni devis venigi kuraciston. . . Tiam ĉiuj judoj el Sobolivko foriris al la stacidomo, kaj tie fariĝis tia bruego, tia tumulto, ke la staciestro ordonis al la ĝendarmo *„forigi la Sobolivkajn judojn de la stacio“*. Tial ni ĉi tie ne povas resti, kaj ni pli bone iru por vidi, kiel fartas la judo kun la pastro sur la forkurinta lokomotivo? Sed facile estas nur diri — *„vidi, kion oni faras sur forkurinta lokomotivo“*. Kiu scias, kio

fariĝis tie? Ni devas kredi la Sobolivkan vinagrofariston mem. . . Li rakontas pri la ,vojaĝo' tiajn mirindaĵojn, ke, se ni diros, ke ili estas duonveraj — ili ankaŭ estas sufiĉe mirindaj, cetere, mi konas la Sobolivkan vinagrofariston kaj laŭ mia opinio li ne estas mensogulo. ,La unuan tempon, tuj kiam la lokomotivo ekkuris — tiel rakontas Berko vinagrofaristo — li ne memoras, kio fariĝis al li, ne tiel de timo, kiel de tio, ke li ne povis kompreni, kial la lokomotivo ne volas lin obei. Laŭ la saĝo — li diras — la lokomotivo devis halti tuj post la dua turno de l'regulatoro, sed malgraŭ tio, ĝi komencis iri ankoraŭ pli rapide ol antaŭe, kvazaŭ mil diabloj ĝin puŝus. Ĝi kuris — rakontas Berko — per tia rapideco, ke la kolonoj de l'telegrafo svarmis kiel muŝoj antaŭ liaj okuloj, kaj lia kapo komencis turniĝi, la piedoj senforte kliniĝis. . . Iom post iom — li rakontas — kiam li rekonsciiĝis, li rememoris, ke lokomotivo havas haltigilon, por haltigi ĝin, kiam oni volas. Ekzistas — komprenigas, per la manoj, Berko, la vinagrofaristo — manhaltigilo kaj aerhaltigilo, tia speco rado, kaj se oni ekturnas ĝin dekstren, ĝi ekpremas la levilon kaj la radoj ĉesas turniĝi (de si mem). Li ne komprenas, kiel tia bagatelo povas forgesiĝi en la kapo? Kaj rememorinte ĝin li rapide ekkaptas la radon — diras Berko — kaj volas ektorni ĝin dekstren, sed iu kaptas lin ĉe la mano: — ,Halt!.' Tiu estis la pastro, paliĝinta, konsterniĝinta kaj apenaŭ parolas: ,Kion vi volas fari?' — demandas kun tremo la pastro. — ,Nenion — respondas al li Berko — mi volas haltigi la maŝinon'. . . — ,Dio vin gardu! — diras al li la pastro — ne tuŝu plu la ma-



ŝinon! Ĉar se vi ne obeos min, mi prenos vin ĉe la kolumo, kaj ekĵetos vin de la lokomotivo, tiel, ke vi forgesos, ke oni nomas vin Moŝko! . . .’

„Ne Moŝko, sed Berko oni nomas min“ — diras al li Berko, kaj volas komprenigi al li la radon, kiun oni nomas haltigilo, sed la pastro ne lasas lin paroli — maldolĉa pastro! „Sufiĉe jam turni — insistas la pastro — vi jam sufiĉe turnaĉis, la diablo vin prenu, vi, malbeninda homo! pli bone estus, se vi mortiĝus, antaŭ ol vi aperis al mi, por pereigi mian vivon!“ Kaj Berko respondas al li: „Ĉu vi eble pensas, paĉjo, ke mia vivo estas ĉe mi ne tiel kara, kiel ĉe vi — via vivo?“ — „Via vivo? — diras al li la pastro kun galo — kian valoron havas hunda vivo? . . .“ Tio ĉi jam treege kolerigis Berkon kaj li donas al la pastro — rakontas Berko — tian grandan porcion da riproĉoj, ke li ĝin eterne memoros. — „Unue — diras al li Berko — oni devas kompati ankaŭ hundon. Laŭ nia leĝo — li diras — oni eĉ hundon ankaŭ ne devas tuŝi. Ĝi estas Dia kreitaĵo. Kaj due — demandas lin Berko — per kio estas via vivo, ĉe la Kreinto de l’mondo pli kara ol tiu de alia homo? Ĉu ni ne devenas — li diras — ĉiuj de unu radiko, de Adamo? Kaj ĉu ni ne ,iros‘ ĉiuj en unu lokon — en la teron? . . . Kaj plue — diras Berko — vidu, paĉjo, la diferencon inter mi kaj vi. Mi faras kion mi povas por haltigi la lokomotivon, t. e. mi zorgas pri ni ambaŭ, kaj vi — li diras — estas tiel incitita, ke vi estas kapabla min ĵeti de la lokomotivo, t. e. mortigi homon! . . .“ kaj ankoraŭ tiajn belajn vortojn li diris al la pastro, li admonis kaj rakontis tiajn

sentencojn — li diras — ke la pastro preskaŭ ploris. Kaj tiel interparolante, ili ekvidis antaŭ si la stacion Zatkeviĉ kaj staciestron, ili komencis svingi per la manoj, sed neniu, verŝajne, komprenis ilin, kaj ili estis devigataj veturi pluen, en Hajsin-on. Dum la plua veturado la pastro — rakontas Berko — fariĝis ‚pli mola‘, sed li tamen ne lasis lin tuŝi la maŝinon kaj ekdiris: ‚Diru al mi, Lejbko‘. . . — ‚Ne Lejbko, sed Berko oni nomas min‘ — interrompas lin Berko, kaj la pastro daŭrigas: ‚Estu Berko, diru al mi, Berko, ĉu vi eble volus kune kun mi desalti de la lokomotivo, sur la teron?‘ . . . — ‚Por kio? — demandas Berko — por ke ni mortiĝu?‘ — ‚Tute egale — respondas la pastro — ni mortiĝos.‘ Sed Berko diras: ‚Kiel vi scias? tio ne estas argumento, se Dio volas — ho — ho — ho, kion li povas fari!‘ . . . — ‚Ekzemple?‘ — demandas la pastro, kaj Berko respondas: ‚Mi diras al vi, paĉjo! Ĉe ni hebreoj estas hodiaŭ tago, kiun oni nomas ‚Hoŝano rabo‘. Dum tiu tago estas decidata, en la ĉielo, la sorto de ĉiu homo kaj de ĉiu estaĵo, en la mondo, ĉu ĝi vivu, aŭ ĉu ĝi mortu, do, se Dio decidis, ke mi mortu, — la morto ja estas ne evitebla, kaj kia diferenco estas, se mi mortiĝos per salto, aŭ per lokomotivo, aŭ per tondro? Kaj simple irante — diras Berko — sur la ebena vojo, ĉu mi ne povas fali aŭ morti? Do, pro kio mi ankoraŭ devas serĉi la morton? Sed se Dio decidis, ke mi vivu, pro kio, do, mi saltu?‘ ‚Kaj kion ankoraŭ mi rakontu al vi?‘ — diras Berko, vinagrofariŝto el Sobolivko, kaj ĵuras tiel, ke oni eĉ mensogulon devas kredi — li ne memoras, kiel tio okazis, sed kiam

ili venis antaŭ Hajsin kaj ekvidis de malproksime la kamentubon de l'Hajsina fabriko, la lokomotivo subite komencis iri pli kaj pli malrapide, kaj poste ĝi, la lokomotivo, „pripensis“ kaj stariĝis. Kial? Verŝajne la „hejforto“ konsumiĝis, kaj ĉe lokomotivo — diras Berko la vinagrofaristo — se konsumiĝas la „hejforto“, la akvo ĉesas boli kaj la radoj ĉesas iri. Tiel same — li diras — kiel homo, al kiu oni ne donas manĝon. . . Kaj Berko tiam diris al la pastro: „Nu, paĉjo? Kion mi diris al vi antaŭe. Se la Kreinto de l'mondo ne volus, ke ni ankoraŭ vivu en la mondo, kiu scias, por kiom da tempo restus la hejforto, kaj kie ni estus jam nun?“ Tiel parolis Berko al li, kaj tiu — rakontas Berko — la pastro staras, mallevis la okulojn kaj silentas. Kion li povis respondi? . . . Sed poste, je la disiĝo, la pastro etendas al li la manon kaj diras: „Adiaŭ, Icko“, kaj Berko interrompas: „Oni ne nomas min Icko, sed Berko“. . . Tiam la pastro diris: „Estu Berko, ĉu vi aŭskultas, Berko? Mi tute ne sciis, ke vi estas tia.“ . . . Kaj pli — rakontas Berko — li ne aŭdis de li, ĉar la pastro levis la basojn de l'sutano kaj komencis marŝi malantaŭen, al sia hejmo en Golovonevsko, kaj li, Berko, direktiĝis rekte en la urbeton, al ni, en Hajsin-on. Ĉe ni li festis, dankis Dion, ke li savis al li la vivon, rakontis la historion eble milfoje de l'komenco ĝis la fino, ĉiufoje aldonante novaĵojn. . . Ĉiu aparte invitis al si la Sobolivkan vinagrofariston, regalis lin, kaj volis aŭskulti la miraklon de „Hoŝano rabo“, nur de li mem — kaj ni havis la gajegan feston — nu — nu!“

## Ne estas feliĉo.

**V**i parolas pri ŝtelistoj? — ekdiras belvestita persono tenante en la mano valizon, kiun li gardas kiel irison de l'okulo. (Tio estis nokte en stacidomo 2a klaso, ni sidis triope kaj atendis la rapidan vagonaron, kiu malfruis horon kaj kvaronon, kaj ni parolis pri ŝtelistoj kaj ŝtelaĵoj.) — „Pri ŝtelistoj vi parolas? pri tio — lasu *min* paroli, ĉar kie okazas en la mondo tiom multe da ŝteloj, kiel en nia negoco? Ĉu brilantoj estas bagatelo? La pasio al brilantoj estas tiel granda, ke inter la aĉetantoj mem estas ŝtelistoj kaj ne tiel inter la aĉetantoj, kiel inter la aĉetantinoj, inter la sinjorinoj. Ni rigardas ĉiun sinjorinon, kiun ni ne konas — „per sepdek sep okuloj“, kaj ne facile oni ŝtelas komercaĵojn ĉe juvelistoj; mi povas fanfaroni, ke, de kiam mi estas komercisto kaj komercas brilantojn, — oni ankoraŭ neniam ŝtelis ĉe mi ion, sed se malfeliĉo estas destinita — nenio helpas, kaj vi aŭskultos, kio povas okazi.

Mi mem ne estas juvelisto, t. e. juvelisto mi estas, sed mi ne okupiĝas per juvelfarado; mi nur estas komercisto, kiu komercas brilantojn. Mi aĉetas kaj vendas brilantojn, pogrande kaj malofte en fremdaj urboj, dum la foiroj; aŭ simple se troviĝas ie aĉetonto, mi prenas ĉi tiun mian valizon en la mano, envagoniĝas kaj veturas. Dume okazas afero: Mi sciiĝas, ke en Jehupec estas riĉulo, kiu edzinigas sian filinon; certe — mi pensas — li bezonas brilantojn. Se oni volas kompreni — en Jehupec troviĝas sufiĉe da juvelistoj, eĉ pli multe, kiom oni bezonas, sed, unu ne koncernas

la alian, estu en Jehupec eĉ dekokmil juvelistoj, vi nur venigu al mi aĉetantojn, kaj mi jam montros, kiu profitos monon, ĉu mi, ĉu ili. Vendi brilantojn estas metio, kiun oni devas koni, oni devas scii, kion montri, kie montri kaj al kiu montri. Mi ne volas fanfaroni antaŭ vi, ĉar mi entute malamas la fanfaronadon, sed se vi demandos juvelistojn pri mi, ili mem konfesos, ke konkuri kun mi estas ne facile: Dum alia profitos cent rublojn, mi profitos tricent. Mi konas la aferon. Unuvorte mi veturas al Jehupec. Mi kunprenis — prezentu al vi — sufiĉan kvanton da komercaĵoj (ni ĉiuj posedu tion, kion ĝi valoris, kvankam ĝi eniĝis en tiu ĉi valizeto!), envagoniĝis kaj sidiĝis, kompreneble, forte apogante min sur mian valizeton, kaj ne deiras de ĝi. Kaj dormi? — pri tio eĉ ne pensu: se oni veturas kun komercaĵoj, oni ne dormas. Kun ĉiu nova persono, kiu eniras en la vagonon, mia koro ekbatas: „Eble tiu estas ŝtelisto?“ Sur la nazo ja ne estas skribite pri honesteco. . . Dio helpis, mi estis veturinta tagon kaj nokton, nek manĝis nek dormis, mi alvenis en Jehupec al la riĉulo, montris mian komercaĵon, parolis, paroladis, eĉ raŭkiĝis kaj kiel ordinare profitis malsanon, sed ne monon. La riĉuloj — mi ne deziras al ili malbonon, sed ĥolero ilin prenu — turmentas la vendiston, ili observadas, palpadas, karesas ĉiun objekton, kaj la fino estas — vantaĵo. Sed kion fari? Se oni profitis aŭ ne profitis — oni devas kuri pluen, eble oni malfruos? Kaj mi endroŝkiĝas kaj ordonas veturi al la vagonaro. Dume, mi aŭdas, iu malantaŭe de mi vokas min: „Sinjoro, sinjoro!“ Mi turnas la rigardon kaj ekvidas — junulon kurantan al mi, kiu te-

nas en siaj manoj valizeton similan al mia valizo, atingas min kaj diras al mi: „Jen, vi perdis!“ . . . Ho, Dio! Ĉi tiu ja estas mia valizo! Kie? Kiam? Kiel ĝi okazis? . . . Sed se Dio volis — ĝi eliĝis el miaj manoj kaj jen, ĉi tiu junulo levis ĝin kaj — kion vi demandas? Mi alkuris al la junulo, premis lian manon kaj dankas lin: „Dankon al vi, Dio donu al vi sanon kaj feliĉon, dankon, kaj milfoje mi dankas vin.“ Kaj la junulo respondas al mi: „Ne estas dankinde.“ Kaj mi diras: „Kion signifas ‚ne estas dankinde‘? Vi ja savis mian vivon, vi faris ja tian virtaĵon, tian agon, ke vi estos en Edeno; diru al mi, kiom da mono mi donu al vi? Kiel rekompenco, diru, ne hontu“, kaj mi enmetas la manon en mian poŝon, sed la junulo detenas min kaj diras: „Se vi mem diras, ke tio estas honestaĵo, kial do mi prenu monon?“ Aŭdinte de li tiajn vortojn mi kompreneble ĉirkaŭprenas kaj kisas lin: „Dio mem pagu al vi por via ago, kiun vi faris al mi! Sed iru almenaŭ kun mi kaj ni ion manĝos, trinkos glaseton da vino.“ — „Glaseton da vino — li diras — bone, kial ne?“ Kaj forgesante, ke mi devas veturi al la vagonaro, mi sidiĝas kun la junulo sur droŝko kaj veturas jam al kafejo por preni ion en la buŝon. . . Veninte en la kafejon, ni eniris en apartan ĉambron, kaj mi ordonis alporti bonajn frandaĵojn, sidiĝis, kaj komencis konversacion kun mia junulo. Tiu ĉi junulo krom tio, ke li savis, por tiel diri, mian vivon — tre plaĉis al mi, li estas simpatia junulo, kun simpatia vizaĝo, kun profundaj, nigraj, seriozaj okuloj — junulo-anĝelo! Krom tio li estas hontema kiel knabino. Mi petis lin, ke li ne ĝenu kaj manĝu tion, kion lia koro

deziras, ke li prenu la plej bonan kaj plej belan frandaĵon, kaj kiom li prenis, tiom duoble mi devigis lin manĝi kaj trinki. Kiam ni bone eltrinkis kaj perfekte gustumis (sed ne pensu, ke por ebriiĝi, judo ne estas ebriulo, sed nur por gajigi nin, ni tion faris) — mi turnas min al la junulo kaj diras: „Ĉu vi scias, kion vi faris al mi? Ke vi savis al mi multvaloran posedaĵon — pri tio vi ne dubu, ni ambaŭ posedu ĝian valoron, ĝi ne estas mia, ĝi apartenas unue al Dio kaj due al fremduloj. Vi simple savis al mi mian honoron, mian vivon, ĉar, se mi estus veninta hejmen, al miaj kreditoroj, sen ĉi tiu valizeto, ili certe opinius, ke tio estas kombinaĵo, artifaĵo, kiun miaj samprofesianoj, juvelistoj, ofte faras. Ili kaŝas la komercaĵon, kaj disvastigas famon, ke oni ĝin forŝtelis ĉe ili. Mi estus devigita nur aĉeti ŝnuron kaj pendigi min al la unua arbo! . . . Ni trinku je nia sano! — mi diras al la junulo — Dio helpu al vi, kiel vi mem deziras, estu sana, ni interkisu kaj adiaŭu, ĉar mi jam devas veturi.“ Tiam mi aliras al la mastro de l'kafejo, kvitiĝas kun li, kaj ekturnas min por preni mian valizon, sed, ho ve! — nek la valizo, nek la junulo estas . . . malaperis! . . . Kaj mi svenis. . . Oni penis rekonsciiĝi min, oni frotis la tempiojn, premis mian nazon, tiris mian ĵus razitan barbon, kaj kiam mi rekonsciiĝis, mi denove svenis, kaj kiam mi bone rekonsciiĝis, mi tiam faris alarmon, mi kunvokis ĉiujn policanojn de Jehupec, promesis bonan rekompencan, kuradis kun ili en ĉiujn necesajn lokojn . . . konatiĝis kun ĉiuj mondŝtelistoj — sed „mia“ junulo ne estas trovebla, kvazaŭ li enflugus en la ĉielon! Mi jam sen-

fortiĝis, la serĉado tedis min kaj mi foriris en mian gastejon, kuŝiĝis en liton kaj pensas: „Kiel oni finas mian vivon? Ĉu mi buĉu min per tranĉilo? pendigu min per ŝnuro? aŭ min ĵeti en la Dniepr-on\*)“, kaj dum mi kuŝas profundiginte en malgajaj pensoj — mi ekaŭdas, ke iu frapas la pordon. — „Kiu estas?“ mi demandas, kaj ricevas respondon, ke „la polico vokas min“, „oni kaptis la birdon“ kun la valizo, kaj la tuta komercaĵo estas trovita!

Ĉu mi rakontu al vi, kio fariĝis al mi, kiam mi ekvidis mian valizon kun miaj brilantoj? — pro ĝojo mi ree svenis. Mi estas svenema. Kiam mi rekonsciiĝis, mi aliras al la junulo kaj diras al li: „Mi ne komprenas, klarigu al mi, mi preskaŭ freneziĝas. Kia estas la afero, ke, kiam vi trovis mian valizon, vi postkuris min, redonis ĝin kaj vi eĉ ne volis preni rekompencan pro via honestaĵo, kaj poste, kiam mi deturnis min, je minuto, — vi forŝtelis ĉe mi mian havaĵon, mian vivon, mian animon? Vi ja malfeliĉigus min. Ankoraŭ minuton kaj mi jam estus malvivulo!“ . . . Kaj li, la junulo, rigardas min, per la profundaj, seriozaj, nigraj okuloj kaj tute kviete diras al mi: „Kio koncernas unu la alian? Tio estas du apartaj aferoj, honestaĵo estas honestaĵo, kaj ŝteli estas — mia profesio.“ . . . — „Junulo, — mi diras — kiu vi estas?“ — „Kiu mi estas? — li respondas — mi estas bedaŭrinde ŝtelisto, posedanto de dekduo da infanoj, kaj granda malfeliĉulo. Mi havas, dank' al Dio, facilan profesion, sed mi ne havas feliĉon al mia profesio, sed mi ne plendas Dion, ĉar mi havas kion

\*) Rivero en Rusujo.



ŝteli, kaj eĉ tre multe mi ŝtelas, sed la domaĝo estas, ke ne ĉiam mi prosperas. Ne estas feliĉo!“ . . .

Kaj poste kiam mi sidis en la stacidomo, mi pensis: „Kia malsaĝa azeno mi estas. Per bagatelo mi povus tiam liberigi de l'polico tiun ŝteliston, kial mi devas kaŭzi al li malbonon, li estu punata pro alia.“ . . .

Ĉu vi deziras eble paron da brilantaj orelingoj, ne multekostaj? Mi montros ilin al vi, vi tiajn brilantojn eĉ en la sonĝo ankoraŭ ne vidis!“ . . .

## Rabĉik.

Hebrea alegorio.

### I.

**R**abĉik estis hundo blanka kun makuloj, ne granda, sed modera, kvieta kaj ne mordema; ĝi ne amis kiel aliaj, iun ataki de malantaŭe, deŝiri baskon aŭ ek-mordi la piedon. Ĝi estis kontenta, se oni ĝin ne tuŝis, ĉar ĝin persekutis ĉiu renkontinto. Ekbatu Rabĉik-on per bastono, trafi ĝin per kalkanumo en la dorson, ĵeti sur ĝin ŝtonon aŭ elverŝi sur ĝin lavakvon — tio estis ĉies ludo, kvazaŭ ĉies devo. Kaj kiam Rabĉik ricevis baton, ĝi ne kontraŭstaris kiel aliaj hundoj, kiuj tuj „montras la dentojn“, ne, Rabĉik dum ĉiu bato mallevigadis ĝis la tero ekkriante: „Aj, oj!“ kaj forkuris kun mallevita vosto, sin kaŝis en angulo, enprofundiĝis en pensoj kaptante muŝojn.

### II.

Kiu estis Rabĉik? de kie ĝi aperis? — tio estas mal-facile scii. Povas esti, ke ĝi restis en la korto ankoraŭ

de l'malnova tempo, kredeble, ke ĝi erariĝis, perdis sian mastron, sin altrudis al la nova mastro kaj restis por ĉiam.

Okazas iam: Vi promenas sur la strato, kaj vin sekvas, paŝo post paŝo, devojiĝinta hundeto. — „Kia trudemaĵo?“ — vi pensas, kaj levas la manon al la hundeto: „For de tie ĉi!“ La hundeto stariĝas, dekliniĝas kiel homo, kiam oni volas lin vangofrapi, kaj sekvas vin plu. Vi klinas vin al la tero, vi eksvingas la manon, kvazaŭ vi ĵetas sur ĝin ŝtonon, sed ne helpas. Vi stariĝas kaj rigardas la hundeton; la hundeto stariĝas kaj rigardas vin; vi rigardas unu la alian, en la okulojn, sen vortoj. Vi ekkraĉas kaj ekiras — la hundeto sekvas vin. Vi senpacienciĝas, kaptas bastonon, kaj, kun kolero, vi kuras al ĝi, tiam la hundeto elpensas rimedon: Ĝi kuŝiĝas sur la teron kun la piedoj supren, tremas kaj rigardas vin, rekte en la okulojn, kvazaŭ ĝi dirus: „Jen mi estas! Vi volas min bati? — batu!“ . . .

Jen tia speco estis nia Rabĉik.

### III.

Rabĉik estis hundo ne frandema. Nenion ĝi tuŝis en la domo. Rabĉik sciis, ke tio, kio kuŝas sub tablo — apartenas al ĝi, kaj plu ne estas ĝia afero. Vere, en la juneco, oni diras, ĝi estis iom petolema. Ĝi provis iam, verŝajne senintence, — forŝteli el vianduĵo piedeton de ansero, sed ĉi tion ekvidis la kuiristino Brajno, judino kun nigraj lipharoj, kaj komencis kriegi: „Ajzik! Ajzik!“ Ajzik estis alveninta ĝuste en tiu minuto, kiam Rabĉik kun la ansera piedeto volis trakuri, kaj Ajzik alpremis ĝin per la pordo tiel, ke duono da Rabĉik restis

je unu flanko de l'pordo, kaj la dua duono — je la alia flanko. Kaj oni ĝin bone „regalis“: ĉe unu flanko ĝin batis Ajzik per bastono en la kapon, kaj en la dua flanko — batis ĝin Brajno per ŝtupo, kaj ne ĉesis krei dum la batado: „Ajzik! Ajzik!“ De tiam restis, ĉe ĝi, memoro: Kiam iu aliris, kaj ekdiris al ĝi „Ajzik!“ — ĝi forkuradis, kien la diablo mem ankoraŭ ne trafis.

#### IV.

Pli ol ĉiu — maldolĉigis al ĝi la vivon Parasko, ukraina servistino, kiu lavis ĉe ni tolaĵojn, ŝmiradis la domon per kalko kaj melkis la bovinon. Kial ŝi malamis Rabĉik-on — estas malfacile kompreni; ŝi ne povis toleri ĝin, kaj kiam ŝi ekvidis ĝin, ŝi ekbrulis je kolero: „Ŝĉob tobi ĥoorobo sobaka nevirna!“... („Malsano cin prenu, malfidela hundaĉo!“...) Sed, kiel spite, Rabĉik amis vagadi nur antaŭ ŝiaj piedoj. Pleje, Parasko sin venĝis al ĝi dum sia laboro: Kiam ŝi lavis tolaĵon, ŝi ofte surverŝis kruĉon da akvo malvarma, Rabĉik malamis tian banon kaj estis poste devigata longe ŝanceliĝi. Kiam ŝi ŝmiris la domon, ŝi ekŝmiris per blanka argilo ĝian vizaĝon, kaj ĝi poste devis sin leki tutan horon. Kiam ŝi melkis la bovinon, ŝi amis „regali“ ĝin per ŝtupo en la piedojn. Rabĉik ellernis saltadi, kaj kiam flugis ŝtupo, ĝi supersaltis la ŝtipon kvazaŭ diablo, sed unu fojon ĝi ricevis per tiu „regalo“ malbelan punon. Parasko ĵetis al Rabĉik ŝtipon, kiu trafis en la antaŭan piedon, tiam Rabĉik komencis kriegi per eksterordinara voĉo, per ĉiuj fortoj: „Aj-aj-aj-aj-aj!“ La homoj de l'tuta korto alvenis. Rabĉik ekvidante homojn

komencis plendi, montris al ĉiu la rompitan piedeton, kvazaŭ dirante: „Jen, vidu, kion Parasko faris al mi!“ . . . Rabĉik opiniis, ke oni ĝin kompatos kaj oni certe senkapigos Paraskon pro tiu afero, sed Rabĉik eraris. La tuta amaso ekridegis; Brajno kun la lipharoj ankaŭ elkuris el la kuirejo, tenante en la mano kulregon, kaj ekviŝante la nazon per la nuda kubuto, ŝi diris: „Oni rompis al ĝi piedon? — tre bone!“ . . . Ankaŭ la petoluloj komencis persekuti ĝin kun kriado kaj fajfado. Alvenis Parasko, kaj „plibonigis“ ĝian sorton; ŝi ekverŝis sur ĝi kruĉon da varmega akvo. Rabĉik ree ekkriegis: „Aj-aj-aj, aj-aj-aj, aj-aj-aj!“ . . . Kaj dum tio, ĝi saltis, turniĝadis, mordis al si la voston, kaj ne ĉesis kriadi per tiaj voĉoj, ke inter la petoluloj la ridado fariĝis ankoraŭ pli laŭta. Kiam oni renkontis Rabĉik-on, saltantan per tri piedoj, oni ekridegis kaj donacis al ĝi „je bona memoro“ kelke da bastonfrapoj. Rabĉik ekkuris kun bojado, lamante kaj trenante la piedon. La petoluloj ĝin persekutis per bastonoj kaj ŝtonoj, kriegis, ridadis, fajfadis kaj ĝin forpelis for, for el la urbeto, ĝis malantaŭ la muelejoj. . .

## V.

Rabĉik forkuris kun la penso, ke en la urbeton ĝi jam ne revenos dum sia tuta vivo! Ĝi kuris en la mondon, kien la piedoj ĝin portos. Ĝi kuris, kuradis, kaj fine venis en la unuan vilaĝon, tie ĝi renkontis la vilaĝajn hundojn. La vilaĝaj hundoj ĝin ĉirkaŭflaris. — „Koran bonvenon, hundo! — ili diras — de kie ĉi venas kaj kia ‚desegnaĵo‘ estas ĉe ci, sur la dorso? Ĝi ŝajnas

esti ia brulvundo? Ĝuste en la mezo de l'felo?" — miras la hundoj.

— „He! — ne demandu! — diras al ili Rabĉik kun malgaja mieno — estas tro multe por rakonti. Ĉu ne estas eble nokti ĉe vi?“

— „Ho, kun granda plezuro! — diras la vilaĝaj hundoj — la strato estas sufiĉe granda kaj la ĉielo ankoraŭ pli granda.“

— „Kiel vi agas ĉi tie por la manĝo? — demandas Rabĉik — per kio vi kontentigas la malsaton, kiam la stomako postulas nutraĵon?“

— „Dank' al Dio! — diras la vilaĝaj hundoj — lavakvoj estas ĉie, kaj en la viando Dio kreis ostojn, ili, la mastroj, manĝu viandon, kaj ni havos la ostojn, kiel ĉi diras — por plenigi la stomakon.“

— „Nu, kaj kiaj mastroj estas ĉe vi?“ — demandas Rabĉik svingante la voston, kiel tiu, kiu volas ĉion ekscii, esplori...

— „La mastroj estas mastroj“ — interrompas la vilaĝaj hundoj.

— „Nu, kaj Parasko?“ — demandas Rabĉik.

— „Kia Parasko?“ — demandas la vilaĝaj hundoj.

— „Jen, tiu Parasko — diras Rabĉik — kiu lavas tolaĵon, ŝmiras la domon kaj melkas bovinon, ĉu vi ne konas Paraskon?“

La vilaĝaj hundoj staras kaj rigardas Rabĉik-on kiel frenezulon: — „Kion ĝi Parask-as al ni?“ Ili flaras ĝin denove kaj disiras unuope, ĉiu al sia loko.

## VI.

„Jen, feliĉaj hundoj!“ pensas Rabĉik kaj kuŝiĝas sur la tero, sub la ĉielo de Dio, kaj volas ekdormi, sed ne

povas. Unue, la brogita felo jukas kruele! Due, grumbas en la ventro; ĝi volus manĝeti, sed ne estas kion, oni devas atendi ĝis mateno. Kaj trie, ne lasas dormi la pensoj, pri kiuj la vilaĝaj hundoj rakontis: „Ne estas ĉe ili Ajzik-oj, kiuj kunpremas per pordo kaj batas per ŝtupo. Estas ĉe ili nek Paraskoj, kiuj surverŝas varmegan akvon; nek petoluloj, kiuj batas per bastonoj, kiuj fajfadas kaj surdigas. Feliĉaj hundoj en la mondo! Kaj mi opiniis, ke nur tie estas mondo. ‚Vermo kuŝas en kreno kaj opinias, ke pli dolĉa ol kreno ne ekzistas\*)‘.“

Rabĉik ekdormas kaj songas pri granda lavakvujo plena je pecoj da pano, intestoj, vejnoj de viando, kaĉo miksitita kun faboj kaj ostoj, — tuta trezoro! Ripaj ostetoj, ostetoj de fiŝoj, haringaj kapetoj ankoraŭ ne ŝmacitaj, kaj similaj. Rabĉik ne scias, kion manĝi komence. — „Bonan apetiton!“ — diras al ĝi la vilaĝaj hundoj, kaj rigardas de malproksime, kiel ĝi aranĝas la „festenon“.

— „Bonvolu manĝi!“ — diras al ili Rabĉik malsincere kaj nur ceremonie.

— „Koran dankon!“ — respondas amike la vilaĝaj hundoj. Subite eksonas voĉo en ĝian orelon: „Ajzik!“ Rabĉik vekigas kaj — estas nur songo! . . .

Matene Rabĉik foriris en la kortojn, serĉis lavakvojn, manĝrestaĵon, osteton, sed ĉie, kien ĝi venis, estis okupita la loko. — „Ĉu oni ne povas manĝeti ĉe vi?“ — ekdemandas Rabĉik. — „Ĉie tie? ne! Eble en alia korto.“ . . .

Rabĉik kuras de unu korto en la alian, sed ĉie la sama respondo. Kaj ĝi ekpensas: „Ĝis kiam mi atendos? Kaj por kio mi devas demandi? Ĉu ne estos

\*) Hebrea proverbo.

pli bone, se mi aliros kaj ekkaptos ion ajn?“ Kaj Rabĉik decidis tiel fari. Sed ĉe la unua „kapto“ — ĝi estis malbele punita de la vilaĝaj hundoj: Unue, oni komencis rigardi ĝin kolere, grincigante la dentojn, kaj poste kelkaj hundoj kune atakis ĝin, mordadis, ŝiradis, vundis al ĝi la voston, kaj eltrenis ĝin for el la korto.

## VII.

Mallevinte la voston, Rabĉik forkuris en alian vilaĝon — denove la sama afero: Unue, ĝi renkontas bonajn vortojn, estas bona gasto ktp., sed poste, kiam ĝi aliras al lavakvujo, oni komencis ĝin rigardi kolere, grincigi la dentojn, ŝiradi, mordadi — kaj for al la diablo!

La vivo kaj la vagado de unu loko al alia fariĝis al Rabĉik tedega, kaj ĝi ekpensis tiel: „Homoj estas malbonaj, hundoj estas ne pli bonaj, do, mi pli bone iros en la arbaron, por esti inter bestoj.“ Kaj Rabĉik forkuris en la arbaron.

Vaginte, sole, en la arbaro unu, du, tri tagojn, ĝi eksentis, ke la ventro pli kaj pli kuntiriĝas, la intestoj sekigiĝas, kaj ĝi, simple, mortos pro malsato kaj soifo! Sed Rabĉik, spite tion, volas ankoraŭ vivi kaj vivadi.

Kaj Rabĉik submetas la voston, etendas la antaŭajn piedojn, eligas la langon, kuŝiĝas sub arbo kaj pensas hundan penson: „Kie oni akiras pecon da pano? Kie oni prenas pecon da viando? almenaŭ ostetojn? iom da akvo?“ Kaj de granda ĉagreno ĝi fariĝas rezonanto, filozofo! Ĝi komencas rezoni: „Kial mi, hundo, estas punata, pli ol ĉiuj bestoj, pli ol ĉiu kreitaĵo en la mondo? Jen birdeto flugas rekte en sian neston. . . Jen kuras

lacerto en sian hejmon. . . Jen rampas vermeto, skarabo, formiketo. — Ĉiu havas hejmon, ĉiu trovas sian bezonon, nur mi hundo: Haŭ-haŭ-haŭ!“ — „Kiu haŭsas ĉi tie, en arbaro?“ — ekkrias preterkuranta lupo, kiu pro malsato eligis la langon.

Rabĉik neniam vidis lupon, tial ĝi opinias, ke tiu estas hundo, kaj ĝi stariĝas malrapide, etendiĝas kaj aliras al la lupo.

— „Kiu ci estas? — demandas fiere la lupo — kiel oni nomas cin? De kie ci venas, kaj kion ci faras tie ĉi?“

Rabĉik tre ekĝojis, ke ĝi renkontis „bonan fraton“, al kiu ĝi povas almenaŭ rakonti pri siaj domaĝoj, kaj ĝi malĝoje komencas paroli. . .

— „Mi diros al vi la veron — finas Rabĉik sian malĝojan rakonton — mi estus tre kontenta, se mi renkontus ĉi tie leonon, urson, aŭ almenaŭ lupon.“

— „Kio do estus?“ — demandas ironie la lupo.

— „Nenio, — diras Rabĉik — se la morto estas destinita al mi, mi pli bone volus pereji de lupo ol morti pro malsato inter miuloj, inter hundoj.“

— „Nu! — diras al ĝi la lupo ekfrapante per la dentoj — sciu, ke mi estas lupo kaj cin volas disŝiri en pecojn, por tagmanĝi. Mi estas tre malsata, ĉar mi jam de ok tagoj ne manĝis!“ . . . Ekaŭdinte tiajn vortojn, nia Rabĉik tiel ektimis, ke la brogita felo komencis tremegi.

— „Reĝa moŝto! Kara sinjoro lupoĉjo — diras Rabĉik per ploranta voĉo — Dio donos al vi pli bonan tagmanĝon. Kion vi havas de mi? Felon kaj ostojn! Obeu min, delasu min, kompatu mian hundan vivon!“ . . .

Kaj dum tio ĉi Rabĉik mallevis la voston, kurbigis la



dorson, rampis per la ventro kaj faris tiajn malbelajn mienojn, ke la lupo preskaŭ svenis pro naŭzo.

— „Kunmetu cian vostaĉon! — diras al ĝi la lupo — kaj forkuru al mil diabloj, ci hundaĉo, por ke mi cian ‚belan‘ vizaĝon ne vidu.“. . .

Nek viva, nek malviva Rabĉik forkuris, levis la piedojn, for — for el la arbaro, ree en la urbeton.

## VIII.

Alveninte ree en la urbeton, Rabĉik preterlasis la korton, kie ĝi elkreskis, kvankam la koro sopiris nur je tiu korto, kie oni batis, bategis. Je tiu korto, kie oni rompis al ĝi piedon kaj brogis la dorson. . . Kaj Rabĉik forkuris al la bazaroj, al la buĉejoj, al la buĉistaj hundoj, t. e. al siuloj.

— „Bonvenon! De kie vi estas, hundo?“ — demandas la buĉistaj hundoj kun oscedo kaj preparas jam noktkuŝejon.

— „Ĉi tieulo — diras Rabĉik — ĉu vi ne ekkonis min? Mi estas ja Rabĉik!“

— „Rabĉik? Rabĉik? . . . konata nomo!“ — diras la buĉistaj hundoj, kaj sin ŝajnigas, kvazaŭ ili ne povas ekkoni, kiu ĝi estas.

— „Kian signon ci havas sur la dorso?“ — demandas Cucek, malgranda hundeto, kaj saltas arogante rekte en la vizaĝon.

— „Certe diferenciga signo ĝi estas, aŭ simple tia ornamaĵo, kial vi ne komprenas?“ — diras kun ŝerco Rudik, ruĝa hundo kun vila felo.

— „Jen, kia absurdo! — respondas Sirko, grizhara hundo, maljunulo, kun unu okulo, kaj kun unu orelo,

— pri signoj demandu *min, mi* komprenigos al vi, kio ĝi estas. Ĝi estas signo de bataloj kontraŭ aliaj hundoj, kontraŭ tutaj amasoj da hundoj.“. . .

— „Ĉiuj parolaĉas — ekdiras Ĵuk, nigra hundo, sen vosto, — pli bone parolu Rabĉik mem, kaj ĝi rakontu al ni.“

Kaj Rabĉik kuŝiĝas sur la teron, komencas rakontisian historion, tre detale, de l'komenco. Ĉiuj kuŝas kaj aŭskultas. Nur la ruĝa Rudik, la ŝercema, interrompas ĝin, ĉiuminute, kun ŝerco.

— „Rudik, ĉu ci fermos cian buŝon? — ekdiras la nigra Ĵuk, la senvostulo, kaj oscedas — rakontu, rakontu, Rabĉik. Ni amas aŭskulti rakontojn post la manĝo.“. . . Kaj Rabĉik ne ĉesas rakonti, per ĝemanta voĉo, sian malĝojan historion. Sed neniu aŭskultas. Cucek mal-laŭte interparolas kun Sirko, Rudik ŝercas kaj Ĵuk „ronkas, kiel dek soldatoj kune“, vekigas iafoje, oscedas kaj diras: — „Rakontu, rakontu, Rabĉik! Ni amas aŭdi rakontojn post la manĝo.“. . .

## IX.

Frumatene Rabĉik jam vagadis sur la stratoj, ĝi staris de malproksime, kaj rigardis la buĉistojn kun la hakiloj, kiel ili hakas la viandon. Jen pendas bova antaŭparto, kun la kolo malsupren, kaj la sango fluas . . . jen kuŝas malsupra parto, grasa, grasega, vera trezoro. . . Rabĉik rigardas kaj envias. La hakistoj dispecigas la viandon, ĵetas de tempo al tempo pecon da haŭto, pecon da viando aŭ osteton — por la hundoj. Kaj la hundoj saltas kaj forkaptas. Rabĉik observas, kiel saĝe la hundoj agas, ili saltas akurate tien, kien oni devas, ne preter-

lasas osteton, kaj ĉiu hundo, kiam ĝi ricevas ion, forpaŝas flanken, kuŝiĝas fiere kaj komencas „festenon“, rigardas ĉiuminute la aliajn hundojn, kvazaŭ ĝi dirus: — „Vi vidas oston? Ĉi tiu osto estas mia, kaj mi ĝin manĝas.“... La aliaj hundoj ŝajnigas sin, kvazaŭ ili ne vidas, kaj en si ili pensas:

— „Ci sufokiĝu per tio ĉi! Ci malsaniĝu! La diablo cin prenu! Tutan matenon ci manĝegadas, kaj ni devas rigardi, kiel ci manĝas, la vermoj cin manĝu!“... Kaj ankoraŭ unu hundo portas pecon da felo por tagmanĝo, kaj serĉas lokon, kie neniu povas ĝin vidi, kaj por ke oni ne malbonkaŭzu al ĝi per la okuloj... .

Alia hundo staras kontraŭ kolerema buĉisto, kiu krias, insultas kaj malpacas kun la ceteraj buĉistoj. La hundo svingas la voston kaj diras flate al la aliaj hundoj: „Vi vidas ĉi tiun buĉiston? Malbona li ŝajnas esti? Ĉu ne? Sed donu al mi Dio tian bonan jaron, kian bonan animon li havas! Li estas kara homo! La plej bona en la mondo! Vera diamanto! Li sincere kompatas hundon; li estas ‚hundamiko‘... Jen vi baldaŭ vidos, kiel ‚flugos‘ al mi osto kun viando — hop!“

Kaj ĝi eksaltas supren, ekkrakas per la dentoj, por ke la aliaj hundoj opiniu, ke ĝi kaptis ion bonegan... .

— „Duoble malnobla — ekdiras unu el la hundoj — ĝi estas flatulo kaj eminenta mensogulo, la diablo ĝin prenu!“... Kaj alia hundo staras apud la ŝtupo, sur kiu oni hakas viandon, kaj dum la hakisto foriras dum minuteto, ĝi saltas sur la ŝtipon kaj lekas ĝin per la lango. Tiam fariĝas bojado inter kelkaj hundoj: Ili ĝin denuncas antaŭ la hakisto kaj ĵuras ĉiamaniere, ke

ili mem vidis, ke la hundo, la ŝtelisto, frandis pecon da viando! Tio estas vera kiel Dio, klara kiel la tago! Ili mortu tuj sur la loko, se ili diras malveron! Ili sufokiĝu per la unua osteto! . . .

Kaj Rabĉik enpensiĝas: „Kia estas mia fincelo? Ĝis kiam mi staros ĉi tie kaj rigardos? Ĉiuj hundoj saltas kaj kaptas, mi ankaŭ faros tion, kion faras ĉiuj hundoj.“ . . . Sed antaŭ ol ĝi prosperas „ion fari“ — la hundoj jam tenas ĝin ĉe la gorgo, ŝiradas kaj mordadas, ĝuste en tiu loko, kiu doloras. . .

Rabĉik mallevas la voston, aliras al angulo, etendas la buŝegon kaj komencas plorboji.

— „Kial ci ploras“ — demandas Ĵuk, lekante sin post la manĝo.

— „Kial mi povas ne plori? — diras Rabĉik — mi estas la plej malfeliĉa el ĉiuj hundoj en la mondo! Mi opiniis, ke ĉi tie, inter miuloj, mi povas ion kapti. Kredu al mi, mi ne uzurpus, sed mi estas treege malsata, mi mortas pro malsato.“

— „Mi kredas al vi — diras Ĵuk kun ĝemo — mi komprenas, kion signifas ‚malsato‘. Mi kompatas cin, sed mi neniel povas helpi al ci. Ĉi tie jam estas ordigite tiel, ke ĉiu buĉisto havas sian hundon, kaj ĉiu hundo havas sian buĉiston.“ . . .

— „Nu, ĉu tiel estas bone? — diras Rabĉik — kie estas la konscienco? Kie estas hundeco, ke hundo povas pereji inter hundoj? Ke malsata povas morti pro malsato inter sataj?“

— „Mi povas helpi al ci nur per ĝemo“ — diras Ĵuk, oscedas kaj dormetas post la manĝo.

— „Se estas tiel — diras Rabĉik kaj sin konsolas — mi iros rekte al la buĉistoj, eble mi ankaŭ akiros buĉiston.“ . . .

— „Kun granda plezuro! — respondas Ĵuk — sed ne iru al mia buĉisto, ĉar se vi iros al mia buĉisto, mi cin senvestigos; kiel mi estas, ci vidas, ĉu ne?“

## X.

Kaj Rabĉik forkuris rekte al la buĉistoj, preterlasis ĉiujn hundojn, kaj komencis flati la viandhakistojn, salti en la vizaĝon kaj svingi la voston; sed malfeliĉe ĝi renkontas hakiston, sanegan kaj fortan knabegon, kiu, verŝajne, je ŝerco ekĵetis hakilon — dank' al la saltkapableco de Rabĉik — ĝi ne trafis, ĉar alie Rabĉik estus dishakita je duone.

— „Ci dancas ja tre bele — diras Rudik kun ŝerco — multe pli bele ol nia Cucek. Cucek! venu ĉi tien kaj ci vidos, kiel oni dancas!“ . . .

Cucek alvenas kaj saltadas rekte en la vizaĝon de Rabĉik. Rabĉik jam plu ne povas elteni, kaj ekkaptas Cucek-on per la dentoj, kuŝigas kaj mordas ĝin en la ventron, venĝante sin pro ĉio, kaj — forkuras.

Ĝi forkuris sole sur la kampon, kuŝigas, kaŝas pro ĉagreno kaj honto, sian buŝegon inter la piedojn, kaj ne volas rigardi la lumon; eĉ ne koncernas ĝin tio, ke la muŝoj ĝin atakis kaj mordas: „Ili mordu, ili ŝiru, tute egale, mi ,iros en la teron'!“ . . .

„Malbela mondo! — pensas Rabĉik — se hundo ne povas resti inter hundoj, *inter siuloj*, eĉ unu tagon — pereu do la tuta mondo!“ . . .

## La trezoro.

**T**ie malantaŭ la mondo, sub la malnova preĝejo troviĝas trezoro.

Tia famo disvastiĝis en nia urbeto.

Veni al la trezoro ne estas facile; sed kiam ĉiuj judoj en la urbeto vivos pace kaj ĝin kune ekserĉos — tiam oni povas ĝin trovi.

Tiel oni parolis, ĉe ni en la urbeto.

Kaj se ĉiuj judoj vivos en unueco, se estos ĉe ili nek envio nek malamo, nek malpaco nek kalumnio, kaj se ili kune serĉos — oni trovos la trezoron, alie, ĝi eniĝos profunden — profundegen en la teron. . .

Tiel oni parolis, ĉe ni, en la urbeto, kaj oni komencis serĉi la trezoron, ĉiu en aparta loko, kaj oni komencis interpuŝi, disputi kaj batali, insultadi kaj malpaci, ju pli longe des pli forte, kaj sole pro la trezoro. Tiu diris: Ĝi devas esti ĉi tie. Alia diris: Ĝi devas esti tie.

Kaj oni komencis interpuŝi, disputi kaj batali, insultadi kaj malpaci, ju pli longe des pli multe, des pli forte, kaj sole pro la trezoro — kaj la trezoro . . . enprofundiĝis pli kaj pli en la teron. . .

## Legendo pri la kreado de l'virino.

**O**rienta legendo rakontas:

Kiam la Kreinto de l'mondo volis krei la virinon, Li ekvidis, ke la tuta materialo estas eluzita por krei la viron, sed ĉi tio ne malkuraĝigis la Kreinton kaj Li prenis de l'serpento — ĝian kapablon turniĝi; de certaj plantaĵoj — ilian kapablon alkroĉiĝi; de l'herbo — la

tremadon; de l'kano — la rektecon; de l'rozo — la  
ĉarmecon; de l'folio — la freŝecon; de l'gazelo — la  
rigardon; de l'suno — la klarecon; de l'nuboj — la larmojn;  
de l'vento — la malfidelecon; de lanugo — la molecon;  
de l'mielo — la dolĉecon; de l'fajro — la flamon; de  
l'pigo — la babiladon.

Ĉion ĉi tion la Kreinto miksis, kaj kreis la virinon,  
— la plej belan el ĉiuj estaĵoj en la mondo.

### Aforismoj.

Kun aldonoj kaj ŝanĝoj de Ŝalom-Aleĥem.

**C**io, kio estas granda, kreskas malrapide. Tiel diras  
Seneka.)

Kaj mi diras: Ĉio, kio estas granda, kreskas mal-  
rapide, krom procentmono, kiu kreskas furiozrapide, sen  
pluvo kiel urtiko.

Kiam vi paroladas, estu via parolado pli bona, ol se  
vi silentas. (Tiel diras araba proverbo.)

Kaj mi diras: Kiam vi silentas, estu via silento pli  
bona, ol se vi parolus.

La scio legi kaj skribi ankoraŭ ne estas klereco, se  
ĝi ne kondukas la homon sur la rekta vojo. (Tiel diras  
Ruskin.)

Kaj mi diras: La scio legi kaj skribi ankoraŭ ne estas  
klereco, se ĝi ne donas diplomon.

La pruneloj malbonigas la kampon, la pekoj pereigas la  
homon, kaj virtoj kondukas al bona fino. (Tiel diras Budho.)

Kaj mi diras: La pruneloj malbonigas la kampon kaj  
kreskas ĉie; la pekoj pereigas la homon, kaj tamen pekas

ĉiuj homoj; la virtoj kondukas al bona fino, kaj tamen estas malmulte da virtaj homoj.

La plej potenca, kiu regas la mondon, estas tio, kion oni ne vidas, ne aŭdas, kaj kion oni ne povas palpi. (Tiel diras Loo-Tse.)

Kaj mi diras: La plej potenca, kiu regas la mondon estas mono, ĉar oni ĝin vidas, aŭdas kaj oni ĝin povas palpi.

Ne la maroj partdividas la popolojn, sed ilia malklereco. (Tiel diras Ruskin.)

Kaj mi diras: Ne la maroj dividas la popolojn, sed la popoloj dividas la marojn.

La homoj eraras ne, ĉar ili ne scias, sed ĉar ili opinias, ke ili scias. (Tiel diras Rousseau.)

Kaj mi diras: La homoj eraras ne, ĉar ili ne scias, kaj ne, ĉar ili opinias, ke ili scias, sed ĉar ili opinias, ke la aliaj ne scias.

Saĝulo postulas multe de si mem kaj malmulte de aliaj. (Tiel diras ĥino.)

Kaj mi diras: Saĝulo postulas multe de aliaj, kaj malmulte de si.

Se la sago ne trafas bone, la bona pafisto kulpigas sin mem kaj ne la sagon. (Tiel diras Konfucius.)


Kaj mi diras: Se la sago ne trafas bone, la bona pafisto pafas ankoraŭ unu fojon.

Vivu, kvazaŭ vi devas baldaŭ morti. (Tiel diras Mark Aŭrelius.)

Kaj mi diras: Vivu, kvazaŭ vi ĵus naskiĝis.



*I. L. PEREC*



## Kio estas „animo“?

(Historio de mia juneco.)

**M**i memoras kiel en sonĝo, ke en nia domo estis vaganta, malgranda kaj malgrasa judeto kun pinta barbeto, kiu ĉiufoje ĉirkaŭprenis min kisante. Poste, mi memoras, tiu judeto estis kuŝanta malsana en lito, ĝemis treege, kaj la patrino staris apud li, batante sin per la manoj je l'kapo.

Ian fojon mi nokte vekigis kaj ekvidis plenan domon da judoj; ekstere de l'strato mi aŭdis korŝirantan ploradon . . . mi forte ektimiĝis kaj ekkriis. Aliris al mi unu el la judoj, li vestis min kaj forkondukis min al najbaro por dormi.

La duan tagon mi ne ekkonis mian domon: Sur la planko estis disŝutita pajlo, la spegulo sur la muro — returnita je la maldekstra flanko, la kandelabro — kovrita per tablotuko, kaj la patrino sidas, senŝuita, en la ŝtrumpoj, sur malgranda tabureto, sur la planko\*). . .

La patrino ekvidante min forte ekploras kriante: „La orfo, la orfo!“ . . . Apud la fenestro brulis lampeto, apude estis staranta glaso da akvo kun pendigita sur la fenestro ĉifono\*). . .

Oni diris al mi, ke mia patro mortis, ke lia animo sin lavas en la glaso da akvo kaj sin viŝas per la tolo . . .

---

\*) Laŭ la moro hebrea dum sep tagoj post la morto de familiano. I. M.

kaj se mi sincere preĝripetas ĉiutage la postmortan preĝon „Kadiŝ“, ĝi, la animo, flugos rekte en la ĉielon.

Kaj al mi ŝajnis, ke la animo estas birdeto. . .

Unu fojon la helpinstruanto kondukas min hejmen el la lernejo; super mi, tute malalte, traflugis birdetoj: — „animetoj flugas, animetoj flugas!“ ekkantis mi.

La helpinstruanto ekrigardis.

— „Malsaĝulo — diras li al mi — tio estas birdoj, simplaj birdoj!“

Poste mi demandis la patrinon: „Kiamaniere oni povas scii la diferencon inter animo kaj simpla birdeto?“

Kiam mi fariĝis dekkvarjara, mi lernis jam talmudon kun ĉiuj ĝiaj malfacilaj komentarioj: „Tosfot“, „Mharŝo“ kaj ĉe la fama melamed\*) Zoraĥ Pinĉ.

Ĝis nun mi ankoraŭ ne scias, ĉu lia nomo vere estis tia, aŭ la lernantoj alnomis lin tiel, ĉar li senkompatate pinĉadis. . .

Li ne atendis, ĝis oni „meritis“ la pinĉon, li ĉiam pagis antaŭe. „Vi devas — li diradis — nur rememorigi min kaj mi jam pagos al vi la porcion!“

Kaj kiam li ekpinĉis, „oni ekvidis la mortintan avinon de tiu mondo“, sed li estis diranta: „Ne ploru, ne ploru vane! mi pinĉas ja nur vian korpon, sed ne la animon. Kio malutilas al vi, se la vermoj en la tombo havos malplimulte por manĝaĉi?“

— „Kaj kio estas la animo?“ mi demandis.

— „Abstrakteco!“ respondis la melamed.

---

\*) Instruisto de hebreaj religiaj libroj. I. M.

Zoraĥ Pinĉ treege malamis sian edzinon, sed tial, ni lernantoj, amis ŝin, kiu pli ol unu fojon savis nin el la manoj de nia melamed.

Precipe *mi* estis ĉiam defendita de ŝi, kaj, kiam la melamed alpaŝis al mi, ŝi ekkriadis: „Mortigisto, kion vi volas de la orfo, la animo de lia patro venĝos vin!“

Unu fojon, mi memoras, vintre vespere, mi venis hejmen de la lernejo kun tute pinĉita haŭto, kiu tremegis pro la frosto.

Tiam mi levis la okulojn al la ĉielo kaj maldolĉkore plorpetis: „Paĉjo! venĝu je Zoraĥ Pinĉ! . . . Sinjoro de l'mondo, kion li volas de mia animo!“

Ke li pinĉas nur mian korpon — pri tio mi forgesis!

Tamen, kiam Zoraĥ Pinĉ dum festa tago estis ferminta la talmudlibron kaj komencis rakonti historiojn — li fariĝis tute alia homo, lia voĉo sonis pli agrable kaj sur lia vizaĝo vagis dolĉa rideto.

Li rakontis al ni, kiamaniere la Reganto de l'mondo elektas animon el sia trezoro kaj enblovas ĝin en korpon. Kaj mi supozis al mi, ke en la trezoro de l'Ĉiopovo la animoj estas metitaj kiel la komercaĵoj en la butikoj de mia patrino, en ĉiuspecaj skatoloj, ruĝaj, verdaj, blankaj, bluaj . . . ligitaj per ŝnuroj.

---

— „Kaj kiam Dio elektas animon — rakontas la melamed — kaj ĝin destinas veni sur la mondon pekantan, ĝi tremas kaj ploras.“ . . .

Poste venas anĝelo en la ventron de l'patrino kaj instruas al la animo la Torah-on (Kvinlibro de Moŝeo). Sed

kiam venas la fina tempo, antaŭ la naskiĝo, la anĝelo ekfrapas la animon je l'nazo kaj ĝi ĉion forgesas\*).

— „Pro tio — diris la melamed — ĉiuj hebreaĵ infanoj havas sulkon sur la supra lipo, sub la nazo.“ ...

La saman tagon ni glitis malantaŭ la urbo kaj mi ekvidis, ke la kristanaj kamaradoj Jantek, Wojcek kaj Jošek havas sulkon je la supra lipo, tute egalan kiel ni.

— „Jošek!“ kuraĝis mi demandi: „Ĉu vi ankaŭ havas animon?“

— „Ne via afero“ — mi ricevis respondon.

Krom tiu ortodoksa instruisto-rabeno, mi havis ankoraŭ alian instruiston, ĉe kiu mi lernis skribi.

En la urbo oni parolis kaj juĝis lin herezulo, kaj mia patrino petis lin, ne instrui al mi herezajn librojn kaj sciojn, sed nur instrui al mi skribi leteron...

Tamen mi ne scias, ĉu li plenumis ŝian peton.

Kiam mi rakontis al li la rakonton pri la sulko sur la supra lipo, li ekkoleris kaj poste ekridegis: „Idiotoj, certe, rakontis al vi tiajn rakontojn.“

Li trankviliĝis, sidiĝis kaj, elviŝante la okulvitrojn, li diris al mi, karesante min:

— „Ne kredu, mia infano — li diris al mi — tiajn malsaĝajn aferojn! Ĉu vi bone observis la kristanajn kamaradojn? Kiaj estas iliaj nomoj?“

Mi diris al li la nomojn.

— „Nu — li demandas — ĉu iu el ili havas alian specon de okuloj, aliajn manojn kaj piedojn aŭ aliajn membrojn ol la viaj? Ĉu ili ne ridas same kiel vi?“

---

\*) Laŭ legendo inter hebreaĵ infanoj.

Kaj kiam ili ploras, ĉu iliaj larmoj estas aliaj ol la viaj? Pro kio ili povas ne havi animon kiel la via? Ĉiuj homoj estas egalaj. Egalaj estas la infanoj, unu Dio estas ilia patro kaj unu tero estas ilia lando! Vere, ke nun la popoloj malamas unu la alian. Ĉiu popolo pensas, ke ĝi estas la krono de ĉiuj aliaj popoloj, ke nur *pri ĝi* Dio pensas, sed *ni* esperas, ke venos tempo pli bona, pli feliĉa tempo, kiam ĉiuj homoj ekkonos unu Dion, unu leĝon, kiam efektiviĝos la vortoj de niaj sanktaj profetoj, ke ĉiuj militoj ĉesos, malaperos envio, malamo, ĉiu servos al unu Kreinto de l'mondo, kiel estas skribite: „Ke la scio eliros el Ciono kaj la vorto de Dio el Jerusalemo!“ . . .

Ĉi tiujn vortojn mi memoris je la preĝado.

La instruisto ankoraŭ multe parolis, sed mi tre mal-multe komprenis; mi ne povis kredi, ke „goj“\*) ankaŭ havas „saĝon kaj animon“, ke ĉiuj homoj estas egalaj, sed mi sciis, ke mia instruisto estas herezulo, ne kredas Dion kaj Mesiaĥ-on.

---

*Unu aferon* mi atentis kaj enkapigis ĝin al mi, ke dum la tempo de Mesiaĥ — ĉiuj popoloj venos ricevi instruon de ni, kaj tia tempo ŝajnis al mi esti tre proksima. Komenciĝis aperi ĉiuj signoj de antaŭ-Mesiaĥa tempo: Oni trovis argumentojn kaj fortajn aludojn en certaj ĉapitroj de l'profeto Daniel. Estis ricevita klara sciigo el Erec-Israel\*\*), ke ŝakalo jam ne venis plu

---

\*) Goj = nehebreo. I. M.

\*\*) Erec-Israel = Lando de Israel = Palestino.

*tiun* jaron al la okcidenta muro\*) de l'Sankta Domo, kaj ĉiun tagon oni vere atendis Mesiaĥ-on ben-Josef. La komunumo sin detenis pagi tributon. Kiam venos Mesiaĥ — kiu memoros postuli tiajn bagatelojn!

Plej malfeliĉan punon ricevis la virinoj — pro tio, ke oni ĉesis ripari, la plafono de l'komunuma banejo putriĝis kaj malsuprenfalis preskaŭ ne mortigante multe da virinoj, kiuj sin banis tiam. . .

La virinoj jam komencis kriadon, malhelpis kaj ne lasis preĝi en la preĝejoj, ĝis kiam oni kolektis iom da mono por nova lignaĵo kaj traboj. Ĉio estas jam pretigita, sed dungi ĉarpentiston oni tamen sin detenas — domaĝe elspezi iom da rubloj!

Kaj mi estas certa, ke en plej mallonga tempo la sama Joŝek, kiu inside etendis al mi sian piedon, dum mi estis glitanta kaj pro kio mi falis kaj preskaŭ rompis al mi la nukon, la sama Wojcek, kiu ĉiufoje montris al mi la langon, kaj la sama Jantek, kiu montras al mi longan nazon per siaj dek fingroj — ke ĉiuj ĉi tiuj venos al mi sin genui!

Kaj mi kompatanto de kompathomoj ne rememorigos al ili la malbonon, kiun ili faris al mi, mi rakontos al ili, mi ilin alproksimigos kaj rakontos al ili *ĉiujn sekretojn* kaj aferojn de Mesiaĥ, por ke ili sciu savi siajn animojn. . .

---

— „Je la nova jaro — oni diris al mi — vi havos novan Rabi\*\*).“ Josef, mia nova Rabi, oni diris al mi, ne pinĉas kaj eĉ ne batas senmotive.

\*) Kiu restis post la detruo de l'Unua Sankta Domo, ruinigita de Nebuĥadnasar, reĝo de Babelo.

\*\*) Rabi = melamed, ortodoksa instruisto, rabeno. I. M.



Rabi Josef estis alta judo kun longaj brovoj, pro kiuj ne estis videblaj la okuloj, longa, blanka barbo, iris malrapide kaj mallaŭte, kaj parolis ankaŭ mallaŭte, kvazaŭ ĉio estas sekreto, skuante la kapon supren kaj malsupren, levis la brovojn, streĉis la frunton, enŝovante la manon sub la nigran tolan zonan.

Ĉiu vorto, kiun li ellasis, ŝajnis esti al mi eĥo de l'ĉielo, kaj kiam li preĝis, tremis, kiel oni diras, eĉ la fiŝoj en la akvo.

Mi estis fiera, esti lernanto de Rabi Josef.

Ankoraŭ antaŭ la Indulgofesto mi havis la okazon paroli kun Josefo pri la animo.

La „animo“ fariĝis la centro de miaj pensoj, eĉ por minuto ĝi ne forlasis min. . . Unue Rabi Josef mokis pri la frateco kun ĉiuj popoloj kaj ĵetis min en ambicion de „elektiteco“:

Ne vane, ni judoj, suferas mokojn kaj ĉiujn specojn de malfeliĉoj. „La patro vergas tiun infanon, kiun li amas“, por ke ĝi volu kompreni kaj edukiĝi bone. . .

— Sed ankaŭ ĉe ni hebreoj, ĉiuj animoj ne estas egalaj: Estas malnoblaj, simplaj animoj, kiel ekzemple ĉe Zoraĥ Pinĉ; via instruisto, la herezulo, havas animon de diablo. Estas animoj grandaj, grandegaj, klaraj kiel plej blanka faruno.

Mi malmulte povis kompreni pri la grandeco de l'animo, mi nur supozis al mi la diferencon de l'animo kiel inter faruno sekala kaj faruno tritika kaj faruno, kiun oni aĉetas por la sabataj kukoj!

„Sed ĉefe — diras Rabi Josef — estas la ĉagrenoj kaj afliktigoj. Eĉ unu animo ne perdiĝas, ĉiuj devas veni

al tiu ŝtupo, sur kiu ili estis antaŭe, kiam ili venis en la mondon, kaj ili estas purigataj nur per ĉagrenoj kaj suferoj; la Kreinto de l'mondo sendas al ni suferojn, por ke ni rememoru pri tio, ke ni estas ne pli ol viando kaj sango, disrumpita potaĵo, *nenio*, kaj kiam Li ekrigardos nin, ni disfalos kiel sablo de l'tero. . . Sed ankaŭ en *tiu* mondo oni purigas la animojn.“

Kaj li rakontis al mi, kiel oni agas en la Geheno kun la malfeliĉaj animoj. . .

---

Dum la festoj mi havis sufiĉe da tempo pensi pri tio. Foje mi songas nokte, ke mi estas en „tiu“ mondo. Mi vidas, kiel anĝeloj etendas siajn manojn el la ĉielo por kapti la animojn, kiuj revenas de l'surtera mondo. La anĝeloj elektas ilin; la purajn, blankajn kiel neĝo, oni ellasas kaj ili, kiel kolomboj, flugas rekte en la Edenon. La malpurajn animojn oni kolektas je amaso, kaj tiun amason oni ĵetas en la maron, apud kiuj staras nigraj anĝeloj kun nigraj manoj kaj lavas ilin, poste oni brogas kaj kuiras ilin en grandaj nigraj potoj, starantaj sur la fajro de l'Geheno.

Kaj kiam oni elpremas el ili la malpuraĵon kaj oni gladas ilin — oni aŭdas la plorkriadon de l'animoj de unu fino de l'mondo al la alia.

Inter la malpuraĵoj mi ekkonas la animon de mia instruisto, la herezulo, oni ĝin purigas, purigadas, sed ĝi fariĝas pli kaj pli nigra. . .

Kaj anĝelo proklamas: „Tio estas la animo de l'instruisto, de l'herezulo!“ Poste tiu anĝelo sin turnas al mi kaj diras kolere: „Se vi paŝos ankaŭ sur tia vojo, sur

kia paŝis tiu ĉi instruisto — via animo ankaŭ estos tiel nigra — kaj fin-fine pereos.“

— „Ne, ne, mi ne iros sur tia vojo“ — mi ekkriis je l'dormo.

Mia patrino vekis min.

— „Kio estas, mia trezoro? — ŝi ektimigita demandis — vi ja naĝas en ŝvitaĵo!“

— „Mi estis, panjo, en ,tiu' mondo!“ . . .

Matene ŝi serioze demandis min, ĉu mi ne vidis la patron. Mi diris: „Ne!“

— „Domaĝe — ŝi bedaŭras — li certe transdonus ion por mi.“

---

Mi forte deziris savi la instruiston, precipe pro lia knabino Genjo. Mi rakontis al ŝi mian sonĝon, sed kion fari? — ŝi sonĝojn ne kredas kaj mokas ilin.

Mi vidis kaj komprenis, ke li por eterne estas perdita kaj mi devas lin eviti, se ne — li pereigos ankaŭ mian animon, mian junan animon!

Mi kelkfoje volis rakonti al mia patrino, *kiu* li estas, sed mi eĉ *unu fojon* ne plenumis mian intencon.

Kelkfoje mi malfermis la buŝon por rakonti, sed ĉiufoje ŝajnis al mi, ke Genjo malantaŭ la ŝultroj de mia patrino etendas al mi sian blankan, plenan maneton kaj faras per la okuloj kvazaŭ dirante: „Ne, ne, ne diru!“

Kaj ŝia peto per la okuloj estas por mi pli forta ol la tuta mia pieco, mi sentas, ke ne nur en fajron kaj akvon mi ĵetus min por ŝi, sed ankaŭ en la Gehenon. Kaj al mi estis domaĝe: La patrino kaj ĉiuj parencoj kredis min fari ion grandan. . .

---

Mi fariĝis deksejara. La svatperantoj komencis al mia patrino turmenti la kapon pri fianĉinoj, kaj mi havis ankoraŭ la knaban kutimon kolekti en la sinagogo post Indulgofesto la restaĵojn de vaksaj kandeloj kaj poste, lernante en la lernejo, ĝin knedi tenante la manojn kun la vakso sub la tablo. . .

— „Kie oni nun legas“ — demandas min unu fojon ne atendite Rabi Josef.

Mi estis enpenŝiginta, kaj en embaraso mi metis ĉiujn kvin fingrojn kun la vakso sur la „gmoro-n“\*). . .

Kompreneble, ke mi ricevis la meritan porcion, sed mi tamen daŭrigis ankoraŭ la knedadon.

Mi havis plej grandan plezuron, kiam mi faris de l'vakso, *kion mi volas*, mi sentis, ke mi estras ion.

Mi estis faranta de l'vakso homan kapon, poste faris de tio katon aŭ muson, aligis du musojn kaj ĝi fariĝis aglo, kaj fin-fine mi de l'kato, muso kaj aglo kune faris kukon. Sed mi mem ankaŭ estis peco da vakso . . . min knedis Rabi Josef, la instruisto, la patrino, kaj kiu nur volis.

Genjo tute deĝeligis min! . . . Oni knedis min, kiel oni knedas vakson, sed tio min doloris, doloregis!

Mi bone memoras, ke tio doloris, sed tio ne tiel koncernis *min* mem, sed la animon. . .

Miaj kamaradoj mokis min, ili alnomis min „animulo“, kaj kiom malsaĝa tia nomo estis — tiom da ĉagrenoj mi devis suferi.

Mi preĝas kaj ripetas la ĉapitron: „Kaj savu nin Dio

---

\*) Libro el la Talmud. I. M.

kaj kuracu nin Dio“ — mi petas korege, sed pensas ne pri la korpo, sed pri la animo:

— „Kuracu, Sinjoro de l'mondo, mian junan animon!“

— „Tiu ĉi estas la ,animulo“ — montras iu je mi mokante.

Tiel mi suferis tage kaj nokte.

---

Genjon oni rigardis saĝulino: La patro nomis ŝin ne alie ol „saĝulino mia“.

La najbarinoj opiniis ŝin spritulino kaj diradis, ke „se ŝi estus tiom pia, kiom ŝi estas saĝa — ŝi estus ĝojo por sia patrino en la Edeno“. Mia patrino ankaŭ ĉiam laŭdis ŝin kaj diris, ke ŝi dezirus ŝin boflino, se ŝi iom pli „kaŝere“\*) kuirus la viandon,

Unu fojon mi venis lernejon kaj la instruisto ne estis hejme, sed sole Genjo estis, kaj mi ekpensis konsiliĝi kun ŝi pri la animo.

La piedoj tremis, la koro batis, miajn okulojn mi malsupren metis, sed mi demandas: — „Oni diras, Genjo, ke vi estas saĝulino, diru al mi, mi petas, kio estas animo?“

Ŝi ridetas kaj respondas:

— „Nenion mi scias!“

Sed subite ŝi fariĝis malgaja, larmoj aperis en ŝiaj okuloj. —

— „Mi rememoris — ŝi diris al mi — ke, kiam la panjo estis vivanta, la patro ĉiam diris, ke ŝi estas lia animo. . . Ili treege amis unu la alian!“ . . .

---

\*) Rite-pure. I. M.

Mi ne scias, pro kio ĝi okazis, mi en tiu sama minuto ekprenis tremante ŝian manon kaj demandis:

„Genjo, ĉu vi volus esti mia animo?“

Kaj ŝi tute mallaŭte respondis: „Jes!“

Kaj kiom da feliĉo mi havis!

Feliĉon, ke ŝi estis unuulino kaj mi — unuulo kaj ni ambaŭ — orfoj, pro kio estis al ni pli facile plenumi nian aferon. Feliĉon, ke la instruisto prosperis kolekti ducent rublojn kiel doton, kiujn mia patrino tre bezonis por sia butiko. Feliĉon, ke oni komencis min opinii, laŭ malvera famo, herezulo kaj neniu alia fraŭlino pro tio decis fianĉiniĝi kun mi, ne turnante la kapon de mia patrino, kaj la plej granda feliĉo estis, ke penso venis en mian kapon — sendi Cipe-n, la svatistinon, kiu parolas kiel maŝino kaj povas unuigi la orientan muron kun la okcidenta, mi promesis al ŝi doni apartan donacon. . . Tamen mia patrino estis kolera je mi kaj ploris: „Ho, se la patro nun vidus, kian bofilinon mi prenas, li ankoraŭ unu fojon mortus pro honto.“. . .

Tiam mi trovis rimedon. Mi nokte ankoraŭ unu fojon komencis kribi, ke mi estis en „tiu“ mondo, sed tiun fojon mi transdonis al mia patrino saluton de mia patro, ke li konsentas la fianĉiĝon. . .

Kaj mi akiris novan animon. . .

\*

## Fratinoj.

**S**injoro Malriĉeco estas vagisto. Nenie li varmigas la lokon . . . kie li tagas, tie li ne noktas. Kaj maljuna li estas kiel la mondo!

Transpaŝinte piede la teron tiom multe da jaroj en la almozedonacitaj botoj kun truoj, pro kiuj li ricevas kalojn kiel pomojn — li povus eldoni veran mondhistorion, pli bonajn geografiojn — sed ili ne estus tiel belaj kaj delikataj kiel tiuj, kiujn ni havas de homoj rigardantaj la mondon de supre, de kasteloj kaj palacoj, de homoj, kiuj kuras nun super tio en aŭtomobiloj kaj lokomotivoj ... sed krom tio Malriĉeco eĉ ne scipovas skribi. Li ne havis tempon por ellerni, kaj eĉ ne havas manojn por skribi! Liaj maldelikataj kalaj manoj estas tiel „konformaj“ al la plumo kiel liaj piedoj al la donacitaj botoj, kaj eĉ tempon por rakonti li ne havas. Tutan tagon — li laboras aŭ li serĉas laboron aŭ „trezoron“ ie, sur amaso da balaaĵo, aŭ li sin ĵetas ien malsata kaj laca apud barilo kaj songas pri tempo Mesiaĥ-a, „kiam kukoj kreskos sur la arboj“! Nokte — aŭ li dormas kiel mortigita, aŭ li rampas kaj skuiĝas sur la lito kiel serpento pro malsato aŭ pro ventrodoloro de l'mangrest-aĵoj sur la balaaĵo, aŭ li malsaĝe fikse rigardas la ĉielon kaj sin mem demandas, kial, ekzemple, ne tondras, aŭ li naskigas infanojn je l'kalkulo de l'Mond-Kreinto, de l'riĉuloj kaj bonfarantoj aŭ je la kalkulo de l'komunumo. . .

La kalkuloj, kiel ŝajnas, ne estas certaj, ĉar amaso da „naskigitaj“ infanoj subite malaperas, kaj tiuj, kiuj restas, estas disvastigataj en la mondon, gefratoj ne konas unu la alian, preterpasas unu la alian, eĉ sen rideto sur la vizaĝo, kvazaŭ fremduloj, escepte, se ili okazas sin en du kontraŭaj litoj en malsanulejo — tiam ili ĝemas kune. . .

Du infanojn de Malriĉeco mi konas — du fratinojn.

Ili jam kelke da jaroj loĝas en Varsovio, renkontas kaj preterpasas unu la alian tre ofte, sed kvazaŭ fremduloj!

Unu loĝas en malluma anguleto, inter naŭ personoj de tri familioj en kelo sur Mokotova strato, kaj ĉiunokte avidas kune kun ili iom da aero, kaj la dua estas avida je tiom da aero inter dek personoj de kvar familioj en la dua ekstremo de Varsovio, en subtegmento, sur Nigra strateto. La unua estas blondulino, la dua brunulino, sed tio ĉi ne malhelpas — ili estas fratinoj, filinoj de Malriĉeco, ambaŭ havas maldikajn, malgrasajn vangojn kaj ambaŭ estas kudristinoj de tolaĵoj. La blondulino laboras por dudek kopekojn tage en societo de dek ses koleginoj en lavejo, sur la Nigra strateto kaj militas, por akiri lokon apud la fenestro, por almenaŭ spiri freŝon aeron, kaj la brunulino ankaŭ ne havas tro fortan bruston, svenas kaj sufokiĝas inter dekok koleginoj, kiuj laboras kune kun ŝi ankaŭ en malgranda dometo kaj ankaŭ por dudek kopekojn tage. Dum la sezono ili laboras ankaŭ nokte, kaj por tio ambaŭ fratinoj faris por si kalikotajn jupojn kaj aĉetis pajlajn ĉapelojn; por aĉeti ŝuojn, mankis mono, kaj ambaŭ elpensis rimedon: ŝmiri per inko la ŝtrumpojn en la truoj de l'ŝuoj. . . Ili ne konas unu la alian, kaj tamen servas unu la alian kiel efektivaj fratinoj. Ĉiutage la blondulino iras de Mokotova strateto, labori grandan parton da tagnokto, anstataŭ sia fratino, la brunulino de l'Nigra strateto, kaj la brunulino ĉiutage iras de l'Nigra strato Mokotovon, por anstataŭi sian fratinnon, la blondulinon.

Ambaŭ trapasas la Saksan ĝardenon. La brunulino venas de Krulevska strato kaj eliras tra Niecala, kaj la



blondulino venas de Niecala kaj eliras tra Krulevska. En mezo de l'ĝardeno ili renkontas unu la alian, preterpasas — kaj nenio.

---

Unu fojon dum julio ambaŭ vekiĝis pro granda varmego. Ili ambaŭ sin banis en ŝvitaĵo kaj al ambaŭ tute mankis aero. Preskaŭ en la sama sekundo ambaŭ elsaltis el siaj litoj: la blondulino en Mokotova strato kaj la brunulino en la subtegmento, en la Nigra strateto. Ambaŭ sin levis rapidege, investiĝis en la kalikotaj jupoj, ankoraŭ unu fojon nigriĝis la ŝtrumpojn ĉe l'truoj de l'gamaŝoj kaj surkapigis la pajlajn ĉapelojn, kiujn ili firme alkroĉigis, la blondulino al la silko-blondaj kaj la brunulino al la gudro-nigraj, preskaŭ kombitaj haroj. Ambaŭ faris ĉi tion antaŭ poŝpeguletoj, kaj ambaŭ ridetis al si mem . . . kaj subite ambaŭ eksopiris je kreskaĵoj, je floroj, je aferoj varmigantaj la koron kaj ankaŭ — je lipharetoj kun okuletoj. La blondulino je nigraj okuloj kaj la brunulino je blondaj kaj bluaj! Kaj ambaŭ ekspiris, ankoraŭ fojon ekrigardis en la speguletojn kaj, ĉar estis ankoraŭ frue, ili kuris en Saksan ĝardenon.

La blondulino venis tra la pordego de Krulevska strato kaj la brunulino — tra la pordego de Niecala. Veninte ambaŭ malgajiĝis.

— „Maldekstre — pensas la brunulino — ĉe la bufedo muziko ludas, sed oni ne enlasas!“

En la nazon venas odoro de bongusta, varmega kakao: „Sed oni ne donas sen mono.“

— „Maldekstre — pensas la brunulino — estas la akvejo, en kiu naĝas fiŝetoj, rimarkinde estas, kiel ili

alvenas, kiam oni ĵetas al ili pecojn da pano — sed mi mem ankoraŭ ne manĝis!“

— „Dekstre oni trinkas gazakvan — ŝi volonte ĝin trinkus — sed sen mono oni ne donas.“. . .

„Eble oni iam donos“, sin konsolas ambaŭ samtempe, ili ja estas fratinoj! Ili ambaŭ rapidas en la centron de l'ĝardeno, la bruado de l'stratoj disvastiĝas inter la miloj da folioj de l'vastaj arbobranĉoj, kaj tamen ŝajnas esti tiel trankvile, tiel mallaŭte. . .

Kaj ambaŭ volas sidi, kaj ambaŭ ankaŭ scias, ke se ili sidiĝos, aliros „lipharetoj kun okuletoj“. Kaj babilos . . . simple babili, babili en freŝa aero inter la bedoj de ĉiakoloraj floroj — estas tre agrable. . . Oni preskaŭ malsobriĝas de l'freŝa aero, oni enreviĝas de l'odoro de l'floroj kaj de l'dolĉaj vortoj, preskaŭ ĉiam fariĝas tiel agrable en la koro — kvankam ĝi tuj malaperas kiel sapoveziko, aŭ oni ekvidas subite ion teruran kaj oni forkuras — sed ili timas, komenci interparoladon, por ne malfruiĝi. Ili sin turnas dekstren al la horloĝo, kaj, ĉar ili estas du fratinoj, ili tion faras samsekunde kaj ili elektas ambaŭ saman benkon kontraŭ la ciferplato, eksidante sur la ekstremoj de l'benko. —

Ĉu ili interparolas inter si?

Ili komencas rigardi unu la alian, sed la saman sekundon alvenas du junuloj kaj sidiĝas en mezo de l'benko kaj sin turnas — brunulo — al la blondulino, kaj la blondulo — al la brunulino. . .

Du paroj babilas. . .

Kaj kiam la montriloj de l'horloĝo montras: „post naŭ“, ambaŭ fratinoj eksaltas leviĝante kaj forkuras.

La blondulino de Mokotovo forkuras tra Niecalo al la Nigra strateto, la brunulino de l'Nigra strateto — tra Krulevsko Mokotovon. . .

Ili eĉ ne intervidiĝis bone. . .

Povas esti, ke en hospitalo, ekzemple, ili iam revidos unu la alian.

\*

### Pidjon ŝebuim\*).

(El la hebrea vivo en Polujo.)

**B**elego, vi pensas, estas elpensitaĵo, kaj la antaŭaj generacioj, ĉu vi opinias, tute ne sciis pri belego? Absurdo! Oni ĉiam sciis pri belego, kiun oni povas ĝui en ĉi tiu mondo, sed ne ĉiu havas feliĉon, ĝui ambaŭ mondojn\*\*). Cetere, belego estas granda tento, oni povas tre facile fali kiel sur glitaĵo. . .

Jen estis iam ankoraŭ tute juna viro Cemaĥ, kiu ricevis grandan heredaĵon — kaj li do mastrumas — dezirinde por ĉiuj judoj! Starigis domon — palacon, koloritajn ĉambrojn, meblojn tegitajn per veluro kaj silko, grandegajn spegulojn; ĉio, simple, blindigis per sia brilo! Kristalaj kandelabroj, arte faritaj, orumitaj tablaj ornamaĵoj . . . kaj vestiblon li starigis, oni diris de eburo farita, kurtenoj ĉiakoloraj, ĉiun jaron, ĉiujn festojn — novajn, freŝajn, domo — Edeno.

Kaj edzinon li havis — vera belulino, ĉarma bildo por pentri portretojn. . . Sed ili „tiun“ mondon ankaŭ ne forgesis, kaj la belulino havis aparte grandan loĝejon,

---

\*) Pidjon ŝebuim = elaçeto de senkulpe kaptitoj, mal-liberigitoj. I. M.

\*\*\*) Ambaŭ = surtera mondo kaj postmorta. I. M.

speguldomon, kiel oni ĝin nomis, pro la speguloj sur ĉiuj kvar muroj, kaj en la domo staris teksiloj kaj kudromaŝinoj por la orfinoj de l'urbeto, kiujn ŝi estis kolektinta ĉiutage du horojn, instruante al ili teksu lanon, brodi kaj kudri per arĝento kaj oro, por tio ŝi havis benitan, lertan manon, majstrino en tiu rilato, krom tio ŝi estis mirinda saĝulino, modesta kaj ankaŭ instruis al ili bonfaradon, per belaj, saĝaj vortoj, rakontis al ili, kiel devas konduti izraelidino ktp. — ĉio ĉi tio estis ŝia virto, ŝia bonfaraĵo.

Ŝia edzo Cemaĥ havis sian bonfaraĵon:

En Polujo estis tempo de absoluta malordo, unu reĝon oni elpelis, la alian oni ankoraŭ ne elektis, kaj dum la tempo de unu reĝo al la alia — ĉiu faris, kion la koro deziris. . . Ĉiu urbopordego estis „limo“, ĉiu bieno — aparta regno, kaj ĉiu bienhavanto — reĝo, kiu havis siajn militistojn kaj siajn malliberejojn.

Do ne mankis malbonaj bienhavantoj kaj ili, kiel ordinare estas, certe furiozis kaj kompreneble, kiel ĉiam, elverŝis sian koleron al la idoj de Abraham, Iĉak kaj Jakob. . .

Suferis treege la izraelidoj, la infanaro, la urbanoj, vilaĝanoj — luistoj de bienaĵoj ktp.\*). Por malbona vorto — vergojn, pro malfrua pago de tributo — malliberejon; oni alkroĉigis labojn al la piedoj kaj enĵetis en malluman, malsekan kavon kune kun la edzino kaj infanoj. . .

---

\*) „Luisto“: Tio estas aparta „profesio“ de la malriĉaj hebreoj, kiuj luas ĉe la polaj bienhavantoj iajn aferojn, en ia ajn vilaĝo: arbareton, ĝardenon, herbejon aŭ domon, aranĝante tie butikon, per kio ili nutras sin kaj sian familion. Plej ofte tiuj hebreoj-luistoj restas en la vilaĝo dekojn da jaroj, kaj multe helpas al la komerca kaj kultura disvolviĝo de l'vilaĝo. I. M.

Cemañ do „okupiĝis“ per „pidjon ŝebuim“, t. e. el-  
aĉeti la senkulpe malliberigitajn, li estis veturanta tra  
la vilaĝoj kun plena monujo da moneroj kaj elaĉetadis.

Unu fojon, tio estis vintre, kiam neĝo preskaŭ super-  
ŝutis la domojn, alkuras al la riĉulo Cemañ la „mela-  
med“\*) el la vilaĝo, kiu instruis ĉe la luisto de l'bieno.  
La „melamed“ apenaŭ spiras pro timo, la okuloj eliĝas el  
la frunto kaj kun ŝaŭmo super la lipoj li rakontas, ke  
oni hodiaŭ matene „atakis“, laŭ ordono de l'bienhavanto,  
la luiston, alligis al liaj piedoj kaj al la piedoj de ĉiuj  
domanoj — pezojn traborjn, trenis kaj oni enĵetis ilin en  
malliberejon, sed li mem, la „melamed“, sukcesis forkuri,  
oni lin ankaŭ volis fortreni, sed li disrompis fenestron, el-  
saltis kaj trans la kampo forkuris, oni ĵetis al li lignaĵon,  
kiu trafis lian piedon, kaj „jen ĝi ankoraŭ sangas“. . .

Oni venigas kuraciston por la „melamed“, kaj Cemañ  
jungigas la ĉevalojn al la glitveturilo, envestas la pelton,  
ne forgesante preni la monujon, diras mallongan antaŭ-  
vojaĝpreĝon kaj veturas. . .

Cemañ pensas, ke la luisto certe ne pagis tributon!

Alkuras al Sinjoro Bienhavanto kaj kun impeto eniras  
— *lin* oni enlasas, li estas ja *Cemañ*, havas aferojn  
kune kun la Sinjoro Bienhavanto — longe paroli li ne  
volas, la frosto krakas, la fenestrovitroj estas koloritaj,  
ŝmiritaj per frostajo, la luisto kun sia tuta familio povas  
dume frostiĝi en la malliberejo, kaj li lakonike demandas:

„Sinjoro Moŝto! kiom ŝuldas la luisto?“

Kaj la Sinjoro Moŝto ridetas tordante la lipharojn kaj

---

\*) Melamed = instruisto de hebreaĵ ortodoksaj libroj. I. M.

en liaj okuletoj aperas malbonaj fajreroj: „La luisto ne-  
niom ŝaldas. . . Ĉu pro tio li enĵetus lin en malliber-  
ejon?“

Cemaĥ ektimiĝas kaj demandas:

„Moŝta Sinjoro, ĉu li ofendis vin aŭ diris al vi mal-  
bonan vorton?“

„Li jam de longe estus pendigita, se tiel.“

„Kion do, Sinjoro Moŝto, kial do?“ demandas Cemaĥ,  
kaj lia koro batas kiel ĉe mortigisto.

— „Nenion — diras la bienhavanto — simple, mi  
scias, ke vi judoj havas grandan Tora-n\*) kun sescent  
dektri virtoj, bonfaraĵoj, kiujn vi, judoj, ne povas *ĉiujn*  
plenumi, kaj pro tio ĉiu judo sin dediĉas al *unu* bon-  
faraĵo, al *sia* bonfaraĵo, por kiu li sin oferas, kaj oni  
rakontis al mi, ke vi prenis sur vin la taskon de el-  
aĉetado kaj, ke vi havas belan edzinon, veran belulinon,  
plej belan el ĉiuj sinjoredzinoj, kaj mi volas, ke vi plenu-  
mu la bonfaraĵon de el-aĉetado . . . por kuniĝo dum  
unu horo kun via edzino! Mi ŝin ne perfortos.“

Ekaŭdinte tion, Cemaĥ forkuras piede, forgesante jam  
la glitveturilon, li preterkuras la malliberejon de l'bien-  
havanto, ĉirkaŭ la malliberejo iradas vilaĝanoj kun falĉ-  
iloj kiel gardistoj, kaj el la malliberejo aŭdiĝas plorado.  
Unu vilaĝano transmetas la falĉilon de l'dekstra en la  
maldekstran manon, kaj per la dekstra maniko li elviŝas  
siajn okulojn:

— „Sinjoro Cemaĥ — li diras — estas grandega kor-  
doloro, unu infano jam frostiĝis.“. . .

Ekdoloris la koro de Cemaĥ kaj li rekuras al la bien-

\*) Tora = Kvinlibro de Moŝe. I. M.

havanto: „Se ne perforti, li ja ne perdis ankoraŭ la konscion“... pensas Cemaĥ.

La bienhavanto rapide investigas en urspelto kaj el-kuras al la glitveturilo, kiu ankoraŭ staris apud la domo. Cemaĥ fingre-aludas al sia veturigisto forkuri, sed la bienhavanto jam sidas en la glitveturilo kaj posttrenas Cemaĥ-on, kiu hezitas sidiĝi en la glitveturilon. La bienhavanto ekpuŝas la veturigiston je la ŝultroj: „Veturu!“ Kaj la malvarmiĝintaj ĉevaloj ekgalopas malaperante en polvo de neĝo kvazaŭ diabloj, flugas. . .

Veninte, Cemaĥ venigas la bienhavanton en apartan ĉambron kaj iras trans la koridoro al la ĉambro de sia edzino. La pordo estas malfermita, kaj ŝi staras inter la orfoj, predikante al ili moralon. Cemaĥ ekvokas ŝin kaj kun kordoloro, plorante, li rakontas al ŝi la okazintaĵon kaj montras al ŝi la ĉambron, kie la bienhavanto atendas ŝin, kaj, antaŭ ol li ricevas ŝian respondon, li svenas. . . Kaj kiam li vekigigas, li ne komprenas, kio okazis, ke li sidas en la vestiblo sur seĝo, laca, kovrita per ŝvitajo. Li malfermas la okulojn, streĉas la orelojn, kaj ekaŭdas la voĉon de l'bienhavanto el ia ĉambro. Li rememoras ĉion kune, eksaltas, alkuras al la pordo, sed ĝi estas fermita; li kliniĝas, fikse rigardas en la truon de la pordoseruro, kaj vidas, kiel ŝi sidas sur la sofo, li apud ŝi sur seĝo, sur la tablo — regalaĵo, kaj li tenas ŝiajn manojn en la siaj, kaj jen li prenas ŝiajn manojn al sia buŝo. — Cemaĥ ekstremas pro timo kaj komencas kuradi tra la vestiblo kaj preterkuras la ĉambron, kie la knabinoj sidas. La pordo estas malfermita kaj li ekvidas, ke lia edzino sidas inter la knabinoj kaj instruas

ilin, ŝia vizaĝo radias per saĝo kaj modesteco — kio estas? ĉu blindigo? Li rekuras al la truo de l'ŝlosilo de tiu ĉambro, ŝi sidas kliniĝinte al la bienhavanto, ŝia kapo sur lian ŝultron, kaj li ĉirkaŭprenas ŝin, almetante siajn pasie malsobrajn okulojn al ŝia pala vizaĝo, la lipharojn al ŝiaj lipoj. — Cemaĥ ree eksaltas pro timigo, kaj li alkuras al tiu domo kaj jen ŝia edzino estas ja inter la knabinoj, li evidente ŝin vidas, li aŭdas ŝian voĉon kaj soife aŭskultas ŝiajn saĝajn parolojn:

— „Izraelidino — ŝi instruas la orfinojn — devas esti pura kiel kristalo.“

Sed li ekaŭdas susuron de tiu ĉambro kaj tio ekjetas lin tien, ŝi tute sin apogis je lia sino, ĉirkaŭprenas per siaj blankaj, nudaj manoj lian ruĝan kolon, buŝo aliĝas al buŝo, lipoj al lipoj ke eĉ sonas . . . kaj korpremas lin kiel frenezeco, kaj li rekuras, kaj ekaŭdas renkonte sur la vojo ŝian dolĉe sonantan voĉon el la spegulĉambro:

„Izraelidino devas esti kvieta kiel kolombo kaj pura kiel kristalspegulo.“ . . . Ektorniĝas la kapo de l'malfeliĉa Cemaĥ, kiu falas sur seĝon kovrita de ŝvitaĵo, kaj tute perdas la konscion. . .

Kaj kiam la horo de kuniĝo pasis, Cemaĥ mem vek-iĝas. La bienhavanto eliras el la vestiblo, Cemaĥ atentas ankoraŭ lian ruĝan nukon, kaj, kiam li malaperas post la pordo, Cemaĥ ĉion rememoras, ektemas, sed ekvidas sian edzinon, venanta dolĉe kaj modeste radiantan, ŝi trankvile alpaŝas al li metante sian manon sur lian frunton kaj diras:



„Pro via pidjon ŝebuim savita mi estas“ . . . — kaj tuj falis svenanta. . .

Kiel glacio Cemaĥ restis rigida sur la seĝo, ellasante sian lastan spiron. . .

\*

### Oni ree ekuzis la pendigilon.

**E**n certa regno estis, ordinare, diversaj homoj, ne tute bonaj kaj piaj, kaj ne tute malbonaj sed — mez-kvalitaj; unu estis iom pli malbona, la alia — iom pli bona, kaj la reĝo de l'regno estis saĝa juĝisto, kiu bone komprenis, kiel pacigi la homojn, kaj neniam okazis severaj punoj; li havis la kapablon, kvietigi la koleron de l'homoj, konvinki la obstinulon, kaj ne sole, dum lia tempo, oni neniun senkapigis, sed eĉ la malliberejo estis malplena, kaj la reĝino tien enlasis kokinojn.

Al la punitaj homoj la reĝo ordonis donaci kelkan monon por mizeruloj, aŭ por la hospitalo — kaj tio estis la puno.

— „Venos tempo — diris la reĝo — kiam homoj, rigardante la pendigilon, kiu staras en la bazaro, neniel komprenos, por kio oni enigis en la teron ĉi tiun trabon!“

Sed ĉi tiun dirinte, la reĝo ekĝemis, kaj neniu komprenis, kion tio signifas. Sed tion rimarkis ankaŭ la filino de l'reĝo, unuulino, kaj obstinis, ke la patro rakontu al ŝi la kaŭzon de l'ĝemo. La reĝo ne povis rifuzi al ŝi, kaj li plej sekrete rakontis al ŝi, ke li ĝemas, ĉar li timas du homojn! La tutan regnon, li diras, oni povas direkti, ĉar en la homoj la bono kaj la malbono estas miksitaj, kaj kiam ili, la homoj, venas al li, la malbono

malaperas, kaj la bono aperas . . ., sed en la regno troviĝas du homoj, unu enhavas en si nur bonon, kaj la dua — nur malbonon. Se ĉi tiuj homoj — timas la reĝo — iam renkontiĝos, tiam ne helpos mia saĝeco, kaj oni denove pendigos kaj senkapigos. . . La filino de l'reĝo enpensigis, pensis, pensadis kaj ne komprenis, kion opinias la reĝo:

— „He — ŝi diris, kaj eksvingis la manon — kion maljunulo povas paroli.“

---

Unufoje estis granda foiro en la ĉefurbo, alveturis kaj alvenis ĉiuj regnanoj, alvenis ankaŭ la du homoj, kiujn la reĝo timis: la absoluta bona kaj la absoluta malbona.

Kaj okazis la jena afero:

Kiam la tute malbona homo ekvidis la pendigilon, en la centro de l'bazaro, li laŭte diris al ĉiuj:

— „Homoj, vi estas kompatindaj! Vi jam de longe ne havas la plezuron vidi, kiel krimuloj pendas kaj ŝanceliĝas en la aero!“ . . .

— „Vere, vere!“ — komencis murmuri la popolamaso.

Ĉi tion aŭdis la tute bona homo kaj diris:

— „Homoj, vi estas feliĉaj, benitaj, Dio kaj bonaj anĝeloj gardas vin; vi vivas tiel bone kaj honeste, ke neniu el vi estas puninda per pendigilo.“

— „Vere, vere!“ — ree murmuris la popolamaso.

— „Ne — ekdiris la tute malbona — la mondo ne estas ĉielo, ĉi tie ne loĝas anĝeloj! Ĉi tie regas nur pekaj; sed ili, la homoj, estas tiaj pekuloj, tiaj krimuloj, ke unu timas akuzi la alian, por ke siaj propraj pekaj ne malkovriĝu, kaj tial ne estas uzata la pendigilo!“

La popolamaso silentas, kaj eĉ estas iom kolera.

La bona homo volas ekparoli, sed la malbona ne lasis diri lin eĉ unu vorton. . .

— „Sinjoroj! — li ree diras — se mi ne diras la veron — argumentu! Kaj mi do volas vidi, kiu el vi sin sentas tiel pura, tiel honesta, ke li ne timas montri per la fingroj tiun, kiun oni devas pendigi! Ne estas eble, ke oni neniun devas pendigi!“

La popolamaso kvazaŭ timigite deiras.

— „Vi vidas, pekuloj! — krias la malbonulo — vi vidas, kiel veraj estas miaj vortoj! Ha! Nu, mi argumentos al vi, ke mi estas pura! Ke mi ne timas!“

— „Jen ĉi tiun oni devas pendigi!“ Kaj li montris la bonulon.

La popolamaso ankoraŭ pli multe ektimiĝis.

La bonulo volas paroli, sed la malbonulo ree ne lasas lin.

— „Ne senintence li laŭdis vin! Ne senintence! Li volas pereigi la pendigilon! — La pendigilon, sen kiu vi devojiĝus de l'bona vojo, kaj viaj infanoj forgesus tion. Sufoku lin! Montru, ke vi ne estas liaj parencoj, ke vi malaprobas lian agon — kiu ne volas kaŝi pekojn, tiu helpu pendigi lin!“

Kaj kiam la malbonulo eltiris el sia sino ŝnuron, tiam centoj da manoj sin etendis, por helpi, kaj post unu minuto la tute bona homo estis pendigita. . .

Ne vane la reĝo ĝemis kaj timis. — Oni ree ekuzis la pendigilon. . .

## Hormuz kaj Aĥrimon.

**L**aŭ la kredo de l'Persoj ekzistas du Dioj: Hormuz — bona Dio, kiu kreas nur lumon, kompaton, saĝecon kaj aliajn ecojn por la homa bezono. La dua Dio estas Aĥrimon — malbona Dio, kiu volas detrui ĉion bonan, amas la mallumon kiel talpo aŭ vesperto, estas kruela kiel Torkvoemado\*) kaj estas amiko de malsaĝuloj — unuvorte de tia Dio gardu nin Dio! Vi mem komprenas, ke se ne estus Aĥrimon, la mondo estus Edeno: Homoj vivus kiel fratoj dunaskitaj, kaj eĉ gedzoj ne dezirus unu al la aliamalbonon; homoj iradus sur la stratoj, kaj ne serĉus negocon, nek trompon, sed nur virtojn kaj bonfaraĵojn; oni vokus: „Kiu estas nuda, tiu venu kaj ni vestos lin; kiu estas malsata, venu kaj ni nutros lin; kiu soifas, tiu venu kaj ni trinkigos lin per akvo, vino aŭ ĉampano . . . laŭ la volo!“

La edzinoj ne portus sur la kapoj flugilojn de speciale por tio pafitaj birdoj! Regus nur bono, bono kaj bono!

Kontraŭe, — se ekzistus nur Aĥrimon, la tuta mondo estus geheno, kiu naĝus kiel ŝipo sur maro da homa sango kaj kiu disvastigus odoron kaj fumon de rostita, stufita kaj fumajita homa viando. . .

Kaj se la mondo estas nek geheno nek Edeno: se malaperas la aŭto-da-feoj kaj la kanonoj ne ĉesas pafi; se estas Pacparlamento en Haag kune kun militoj; se estas mondkongresoj kaj ŝovinismo ktp. — tio do estas, ĉar Hormuz kaj Aĥrimon ekzistas *samtempe*, kaj ili batalas unu kontraŭ la alia.

---

\*) Fama kruela inkvizitoro en Hispanujo. I. M.

Ĉi tion mi scias ne tute per persaj libroj, sed ankaŭ per mia konato mem, maljuna Perso, kiu loĝas „vis-à-vis“ en la sama domo; mi okaze konatiĝis kun li, kaj ni ĉiam estas kune kaj intimaj kiel du fidelaj fratoj. . . Kiam ni renkontiĝas, ni kore salutas unu la alian.

— „Kiel fartas via ,*malsaĝulo*‘\*)?“ li demandas kun rideto.

— „Dume li estas kvieta — mi respondas. — Kaj kiel fartas Hormuz?“

— „Li venkos! — diras kun aplombo la Perso — *li devas venki!*“

Kaj la maljuna optimisto kun certeco purigas la nazon, viŝas la tutan vizaĝon per fularda ruĝa tuko, kiu sufiĉus kiel standardo por la bona Dio Hormuz.

Sed, unu fojon la Perso ne estis certa.

— „Kiu scias — li diras — kiu scias! Aĥrimon estas ruza, ruzega strategiisto! . . . Ĝis la tempo, kiam Aĥrimon malkaŝe batalis kontraŭ Hormuz — mi estis certa, ke fin-fine Hormuz venkos kaj triumfos tagon, post kiu neniam venos jam mallumo! Sed mi rimarkis“ . . . —

— „Kion vi rimarkis?“ — mi demandas. Ni sidiĝas sur benkon (estis bela somera tago kaj ni estis en ĝardeno) kaj la maljuna Perso ĝemas:

— „Mi rimarkis — li diras — ke Aĥrimon ŝanĝis sian taktikon kaj efektive jam fariĝis danĝera. . . Li friponas! Li sin maskas! Li sin ŝajnigas humila kontraŭ Hormuz, parolas mioldolĉajn vortojn, kaj trompas Lin ,de la kapo ĝis la piedoj‘\*\*). . . Hormuz, la bona, sin lasas trompi.“ . . .

\*) La Hebreoj nomas la malbonan anĝelon „*malsaĝulo*, junulo“. I. M.

\*\*\*) Hebreja frazo, kiu signifas „forte trompi“. I. M.

— „Ĉu estas eble?“ — mi demandas.

— „Aŭskultu — respondas la Perso — mi donas al vi kelkajn ekzemplojn pri Lia taktiko:

Jen, ekzemple, en la pratempo, kiam Hormuz volis surprizi la mondon, liveri plezuron kaj kreis mirindan belan virinon — venadis Aĥrimon kaj spite ektuŝis per la malpura mano ŝian frunton, ŝian vangon kaj sufiĉe: ĉe ŝi jam elkreskis korno, lepro . . . Sed kion li sukcesis? — Hormuz tuj ĝin ekvidis, sendis radion de sia favoro: La korno malaperis, la lepro malaperis kaj la belulino fariĝis ankoraŭ pli bela, pli modesta kaj pli estiminda. . . Sed nun Aĥrimon agas alie: Li ŝajnigas sin, kvazaŭ li estas feliĉa kaj kontenta de ĉio, kion Hormuz faras!

Li sin vestas per frako kaj klakĉapelo, montriĝas antaŭ la virino kaj diras kun dolĉa rideto: „Sinjorino (aŭ fraŭlino), mi gratulas vin pro la favoro de mia sinjoro Hormuz! Vi meritas tion . . . la tuta mondo devas genui antaŭ via senmorta beleco!“ . . .

Kaj jam! De la belulino fariĝas koketulino, venena serpento. . .

Hormuz, ekzemple, iam vekiĝas kaj ekvidas, ke malriĉulo malfacile laboras kaj ne havas vivrimedojn. Bonan koron Li havas, mono en la trezoroj ankaŭ ne mankas, Li do prenas kelke da kopekoj kaj ĵetas ilin malsupren, por la malriĉulo. . .

Antaŭe, Aĥrimon sendis rabistojn, ŝtelistojn, por forpreni de l'malriĉulo la donacon de l'bona Dio, sed ĉi tio ne efikis; ĉar Hormuz komencis doni, donadi kaj donaci! . . .

Sed nun Ahrimon agas alie. Hormuz donis al malriĉulo kelke da kopekoj, — tre bone! Li ankaŭ konsentas kun Hormuz, kontraŭe, tio estas por Li bona ekzemplo, Li ankaŭ volas esti bona! Kaj li ĵetas al la malriĉulo plenan pakajeton da oraj moneroj! La malriĉulo fariĝas riĉulo, la mono plimultiĝas, kaj ju pli multe, des pli magnete ĝi fariĝas, des pli granda fariĝas la pasio al ĝi! Kaj la fariĝinta riĉulo, inter malriĉuloj, *jam ne povas esti feliĉa!* Li eĉ trankvile ne povas dormi . . . la malriĉuloj, ĉirkaŭe, ankoraŭ pli multe estas maltrankvilaj! . . . Tiamaniere Ahrimon sukcesas!

Hormuz volas ion donaci al iu, ekzemple — forton, koron de leono! — tia persono utilas por ĉiu popolo, kaj ĉiutempe! —

En la pratempo, kiam Ahrimon volis pereigi tian personon, Li sendis al li tutajn amasojn da diabloj, por ke ili kaptu kaj buĉu lin, sed Hormuz ne lasis: kontraŭ la amasoj da diabloj Li sendis amason da anĝeloj, ili forpelis la diablojn ree en la Gehenon kaj la heroo estis heroo. Sed nun Ahrimon agas alie: Hormuz donas forton, — Ahrimon ankaŭ aldonas iom da forto, kaj la benita, de Hormuz, fortulo fariĝas aventuristo, sovaĝulo, ĉar la troigita forto puŝas lin, kaj, anstataŭ utilojn, li alportas la plej grandajn malutilojn!“ . . .

La suno subiras, kaj tiam estas la tempo, kiam la Perso devas foriri hejmen, li adiaŭas:

— „Ankoraŭ ekzemplon — li diras leviĝante — mi volas doni al vi:

Homo devas manĝi, ĝui la manĝon, kaj tial Hormuz kreis por li — inteston; ĝi estas necesa, sen ĝi oni ne

povas vivi! Kion faras Aĥrimon? Li ja ne eltranĉas la inteston ĉe la homo — Li do aldonas *blindan inteston*, ankoraŭ peco! Kaj ĉi tiu peco jam estas danĝera afero, de tio oni jam suferas!“

.....  
La Perso foriris kaj mi ekpensis: „Ĉu li ne estas prava? Hormuz donas al ni senton por ami niajn proksimulojn, nian patrujon, nian popolon, pro kiu ni laboras, pro kiu ni nin oferas. Kion do faras Aĥrimon? — Li iom troigas la senton, kaj de nacionalismo fariĝas — ŝovinismo, de l'nobla sento fariĝas fanatikeco, kiu nek varmigas nek lumas, sed brulas en mallumo kaj povas nin mem forbruligi!“ . . .

Kaj mi konvinkiĝis, ke la Perso estas prava.





## INTERNACIA MONDLITERATURO

**La kolekto estas submetita al la gvidado de Prof. D-ro Joh. Dietterle, direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.**

**Ĝi enhavas nur la plej famajn verkojn el ĉiuj naciaj literaturoj. — Ĝis nun aperis:**

Volumo 1:

**Goethe, J. W. von: Hermano kaj Doroteo.** Eposo idilia. El la germana originalo trad. B. Küster. 2a, korektita eldono. Kun antaŭparolo de Prof. D-ro Joh. Dietterle. 1922. 77 paĝoj. Kartonita.

Volumo 2:

**Niemojewski, A.: Legendoj.** El la pola originalo trad. B. Kuhl. Kun antaŭparolo de Antoni Grabowski. 2a eldono en preparo.

Volumo 4:

**Raabe, Wilhelm: La nigra galero.** Historia rakonto. El la germana originalo trad. Prof. D-ro Fritz Wicke. 2a, korektita eldono. 1922. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 7:

**Chamisso, A. de: La mirinda historio de Petro Schlemihl.** El la germana originalo trad. Eug. Wüster. 1922. 84 paĝoj. Kartonita.

Volumo 8:


**Stamatov, G. P.: Nuntempaj rakontoj.** El la bulgara originalo trad. Iv. H. Krestanoff. 1922. 80 paĝoj. Kartonita.


Volumo 9:

**Ŝalom-Aleĥem. Perec.** Hebreaj rakontoj. El la hebreaj originaloj trad. Is. Muĉnik. 1923. 78 paĝoj. Kartonita.

**En preparo:** Tradukoj el la literaturoj: angla, estona, franca, holanda, hungara, pola, rusa, sveda ktp.

**FERDINAND HIRT & SOHN-LEIPZIG**  
**ESPERANTO-FAKO**







Książnica Podlaska  
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000678408